

trimestriel

1<sup>er</sup>  
trimestre  
2008

# LA INFORMILO

N° 141

mars  
2008



l'espéranto



la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

éditeur

**ESPERANTO  
FRANCE-EST**

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale  
**ESPERANTO**

regroupant  
les départements  
**Meurthe-et-Moselle ( 54 )**

**Meuse ( 55 )**

**Moselle ( 57 )**

**Bas-Rhin ( 67 )**

**Haut-Rhin ( 68 )**

**Vosges ( 88 )**

Maison des Jeunes  
et de la Culture  
« Philippe Desforges »  
27, rue de la République  
**FR - 54000 NANCY**

**ABONNEMENT / ABONO**

annuel / jara

**12 €**

eksterlando

**16 €**



Entrée principale de l'université de Wuhan.



Obernai, cité pittoresque de l'Alsace

Ce fut un véritable privilège pour Joanne, dix-sept mois, Annaïs, huit ans et Maureen, cinq ans et demi - dans l'ordre du cliché- d'avoir pu accueillir à la maison, durant presque un mois, une jeune fille d'un aussi lointain pays, avec laquelle ils allaient partager activités didactiques, jeux, sorties... et conversations multilingues, générées par la seconde langue de base de la famille, en l'occurrence l'espéranto.

Si la décision d'inviter une jeune fille "au pair", qui plus est, originaire d'un pays non européen, requiert du demandeur un vrai "parcours du combattant", le recours à l'espéranto et à ses associations spécifiques a permis à Cyrille de méconnaître les obstacles habituels pour faire vivre à toute sa famille une expérience enrichissante relatée en détail dans ce bulletin. Nos lecteurs pratiquants de la langue internationale découvriront également en parallèle le "rapport" de Nian, qui d'emblée fut considérée comme la "quatrième fille" de la famille... un nouveau témoignage attestant que l'espéranto, outil performant d'intercommunication, est de surcroît la langue de l'amitié sans frontières !

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>esperanto</b> <i>France-Est</i>		<b>Orient-Franca</b> <b>Esperanto-Asocio.</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		<b>PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC</b>			
		tel. (+33) 03.29.79.01.44 poŝ-tel. 06 98 09 62 81		pol.denis@orange.fr	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Gilbert STAMMBACH 24, rue Albert Zimmer 67610 LA WANTZENAU	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@mageos.com
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag07@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Junul-respondeculino <i>Responsable Jeunes</i>	F-ino Violette WALTHER 8, rue Philippe Rueff 67800 BISCHHEIM	09 54 86 08 30	walther.violette@wanadoo.fr
Junul-respondeculo <i>Responsable Jeunes</i>	S-ro Frédéric PORRETTI 48, rue de la ferme 68110 ILLZACH	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
PKK <i>Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Aliaj komitatanoj  <i>Asseseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	Liliane.Bersweiler@ac-nancy-metz.fr
	S-ino Marie-Claude BOREGGIO	03.88.96.47.26	marie-claude.boreggio@wanadoo.fr
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	F-ino Lucile GEREMIA		lucile.geremia@wanadoo.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ro Robert KUENY	03.89.82.37.62	
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr

<b>Abono al La Informilo</b> →	Francio: 12 eŭroj Eksterlando: 16 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>	← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>	← <b>Paiement par virement au compte</b>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

<b>SOMMAIRE</b>			
page 2	ours	22	Montreal
3	édito / nouveau site	22/24	Argumentaire
4/5	Ci Piron	25/26	Pionniers aviation
6	Dr UNESCO	27	Autodidactisme
7/8	Hurstel	28/29	Maillard/Nancy
9	Mulhouse	30	Poètes
10/11	Eo / Nancy	31	Jaci
12/13	Kaléidoscope (1)	32	Trésorier
14/19	Rapports	33/34	Libroservo
20	Semaine espagnole	35	Détente
21	Kaléidoscope (2)	36	Photothèque
34	a b c d		adhésion stage

**ISSN 0291 6037 trimestriel**  
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  
édité par l'association culturelle  
**Esperanto France-Est**  
MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République  
54000 NANCY  
Directeur de la publication : **Gilbert STAMMBACH**  
Rédacteur : **PoI DENIS**  
Dépôt légal : 31 mars 2008  
Imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole  
Place de l'Ecole Normale 55000 BAR-le-DUC  
N° CPPAP : **0409 G 83517**

*Trafe konvinki...*

Internaciaj vojaĝoj estas ofte okazoj por konsciiĝi, kiom efike Esperanto povus helpi al interkompreniĝo inter ne-samlandanoj...


Atendante en flughavena kafejo, pro aviadila malfruigo, mi tion konstatis refoje. Miskomprenoj, nekomprenej pri informoj donitaj al ne-samlingvanoj... Ni ĉiuj certe jam spertis tiun evidentecon : nia internacia lingvo indas kaj povus solvi multon, se ĝi havus la rolon, por kiu ĝi estas preta.

Tamen, gravas neniam troigi niajn argumentojn, neniam maltaŭge fanfaroni pri Esperanto aŭ primoki tiujn, kiuj ne spontane konsentas pri ties efiko.

La vojo estas mallarĝa por konvinki plej trafe, plej profesie, kaj tamen akcepti, ke aliaj ne tuj kaj nepre samopiniis, diverskiale... Oni rajtas kontraŭ-argumenti Esperanton sen nepre esti malsana stultulo.

Ĉiam gravas krei respektive faciligi debat-okazojn.

Ĉiam gravas montri per nia propra konduto, ke Esperanto funkcias kaj povas, eĉ jam nun, feliĉigi ties uzantojn.



... à nos amis et abonnés internautes...

... al niaj geamikoj kaj abonantoj, ret-uzantoj...

Vous pouvez dorénavant consulter **le nouveau site** de l'Association Esperanto France-Est mis en place par notre trésorier André Grossmann :

<http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr>

ou <http://esperanto.france.est.free.fr>

Ce site propose à tous les usagers, sympathisants ou simplement curieux un panorama exhaustif du

### "Phénomène ESPERANTO" !

Faisant suite à la *présentation du site* on découvrira dans la rubrique *sommaire* les titres suivants :

- *un peu d'histoire*, les *services offerts* ( librairie, stages de fin de semaine, bulletin trimestriel bilingue, matériel d'exposition... ), *clubs locaux* en activité, *informations* sur les abonnements aux parutions régionales, *composition* du directoire actuel d'Espéranto France-Est, *fonctionnement* du service de librairie avec une innovation : un *site annexe* qui offre une *histoire détaillée* de l' Espéranto en Alsace et en Lorraine depuis... un demi-siècle, soit 300 pages également proposées sous forme de disquette !
- ... un tableau pluri-informatif particulièrement riche :

#### à ce jour l'Espéranto :

- *apprendre l'espéranto chez soi*
- *activités ponctuelles des clubs* ( mise à jour permanente )  
ex. : fin de semaine culturelle de Vigy, le mois de l'Europe à NANCY !...
- une "*multipage bilingue*" de *Mulhouse-Espéranto* avec photothèque actualisée !
- *l'espéranto dans le monde*
- un *calendrier international* très détaillé invitant à une multitude de participations, rubrique qui étonnera les contempteurs de la langue internationale !...
- le *service de correspondance KoSoMo* diffusant ses informations... en 7 langues !
- la *page spécifique* de l'association nationale **Espéranto-France**....  
et un "*panorama*" avec des échappées culturelles de valeur...

... notre nouveau site est à consulter et à recommander de suite !

## Claude Piron (1931–2008)

La 22an de januaro 2008 en sia hejmo forpasis unu el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj **Claude Piron**.

Naskita en Belgio, li en 1978 iĝis svisa civitano, laboris kiel tradukisto ĉe UN (1956–1961) kaj ĉe la Monda Organizo de Sano (1961–1969), poste lernis psikologion kaj ekde 1969 praktikis psikoterapion, instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakolo de Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis 1994.

Claude Piron esperantistiĝis kiel lerneano en 1943, en 1957 li kunfondis la unuan Esperanto-klubon ĉe UN (UN-EK) kaj estis reprezentanto de UEA ĉe UN. Li multe instruis, prelegis, artikolis, polemikis, verkis  plurajn librojn. Grandan popularecon al Piron donis t.n. “ĉu-romanoj”, kiujn li verkis sub la pseŭdonimo Johán Valano, plurfoje reeldonita lernolibro *Gerda malaperis*, muzika kasedo *Frandu Piron*. Kelkaj liaj verkoj estis tradukitaj al aliaj lingvoj. *Laŭreato de Belartaj konkursoj de UEA*, de la *premio de OSIEK* (1998) pro la libro *La bona lingvo kaj de la premio Duguĉi* (1993), *honora membro de UEA* (1998).

Ni funebras kaj kondolencas.



La Ondo de Esperanto

# Claude Piron : une vie à rapprocher les hommes

Son nom est une référence dans le monde de la communication. Le Namurois Claude Piron vient de décéder en Suisse, âgé de 77 ans.

Rosetta FLOCHON

Des trois frères Piron, il en est un qui n'a pas choisi la voie de la photographie. Il s'agit de Claude Piron décédé il y a quelques jours à Gland en Suisse. Jacques et Pierre ont accepté d'évoquer celui qui s'est exilé depuis très longtemps, mais dont bon nombre de Namurois ne manquaient pas de leur demander régulièrement des nouvelles.

Claude Piron fait en effet partie des gens d'ici ayant rayonné à l'étranger. Pas dans un pays particulier : il était l'homme de tous les continents. Son nom se retrouve d'ailleurs sur des centaines de pages du net, toutes cultures confondues. « *Le départ de Claude est une perte pour l'humanité* », dit d'emblée son frère Pierre.

Et d'évoquer les ouvrages qu'il a laissés, tous empreints de cet idéal d'un monde où l'homme aurait appris à mieux vivre avec lui-même et avec les autres, grâce à une authentique communication.

### Un doué pour les langues

« *Il a toujours été doué pour les langues* », livre Jacques, son frère aîné. Il avait des certificats qui lui ont permis de traduire le russe, le chinois, l'anglais et l'espagnol au

siège des Nations-Unies à New-York. Puis à l'Organisation Mondiale de la Santé en Suisse, où il avait choisi de vivre avec son épouse française et leur premier enfant à naître. « *Il préférerait une autre ambiance que les Etats-Unis pour élever sa fille. Et figurez-vous qu'aujourd'hui elle y vit !* », souligne l'aîné des frères.

« *Quand il avait quatorze ans, à la fin de la guerre, il allait bénévolement faire l'interprète à l'hôpital Saint-Camille pour les personnes déplacées, principalement des gens des pays de l'Est* », mettent en avant Jacques et Pierre, toujours émerveillés par les dons du cadet en langues.

Après des humanités à l'Institut Saint-Louis, Claude Piron poursuit une licence en sciences commerciales et consulaires à Saint-Ignace, à Anvers. Et c'est l'Inde qu'il choisit comme sujet de mémoire. Quelques années plus tard, il créera d'ailleurs les amitiés belgo-indiennes pour mieux faire connaître ce pays dont la prise d'indépendance l'avait fasciné.

### La voie du cœur

La belle-sœur de Claude Piron, l'épouse de Pierre, évoque l'autre

carrière de celui dont elle lisait avec bonheur les ouvrages ainsi que ceux qu'il lui conseillait. C'est que, dans son désir de voir les hommes heureux, vivre en harmonie avec eux-mêmes et avec les autres, Claude Piron s'est ainsi formé à la psychologie et est devenu psychothérapeute. « *Le jour de sa mort, il venait de recevoir un patient*

*et devait faire de même l'après-midi* », partage-t-elle.

Mais ce qui fait que cet homme était connu à travers le monde, est l'énergie qu'il a déployée à démontrer que l'espéranto est la langue universelle capable de briser la barrière des langues entre les hommes. Facile et logique à apprendre, quasi sans exception, elle lui a appris à toucher du doigt son idéal profond d'une communication authentique, au-delà des frontières.

## Réconcilier les hommes avec les langues

Celui qui fut également professeur à la Faculté de psychologie de Genève, a aussi contribué à réconcilier bien des gens avec l'apprentissage des langues aux quatre coins du monde.

Valère Dumont, un jeune Namurois, évoque ce grand humaniste :

« *Claude Piron était devenu pour moi une Référence. A travers ses textes en espéranto, j'ai découvert une langue simple et efficace. créée avec le souci d'être compréhensible par tous. Quand je lis un texte de Claude Piron, je n'ai à aucun moment l'impression de lire*

*une traduction. Ses textes m'ont aidé à progresser et à me détacher du français quand j'utilise l'espéranto dans mes voyages. Ses textes sur l'espéranto, son ouvrage Le défi des langues [Ed. L'Harmattan], ses interventions sur Agoravox m'ont permis de dédramatiser, de digérer mes échecs scolaires en langues. C'est de lui, que pour la première fois, j'ai entendu qu'apprendre une langue étrangère était terriblement difficile. J'appréciais aussi ses textes pour l'humilité, la modestie de leur ton, et pour le recul qu'ils m'apportaient* ».

# Omaĝe al Claude Piron

Vendredon, la 25an de januaro 2008, je 18:33

- Claude Piron malaperis: Gerda ploras! (1)**  
**Klaŭdjo mortis? Vere aŭ fantazie? (2)**  
**Ĉu li nun vojaĝas trakosme? (3)**  
**Sendube, kiel la meteoro. (4)**  
**Tamen, vojaĝante, li ĉiam rakontas novelojn. (5)**  
**Sed, lasu min paroli plu : (6)**  
**Por tiu lasta vojaĝo, li certe surŝultrigis la dorsosakon de Panjo Rut'. (7)**  
**Kien? Tien. (8)**  
**Kio mortigis lin? Eble, kisa malsano. (9)**  
**Tiaj ni estas. (10)**  
**Dank'al la belaj verkoj de Claude, por ni vivi estas miri! (11)**  
**Dankon! Dankon, amiko! (12)**

Ĵeo \*\*\*

- (1) *Gerda malaperis!* (didaktika romano)  
 (2) *Vere aŭ fantazie?* (rakontaro, 1989)  
 (3) *Ĉu li venis trakosme?* (krimromano, 1980)  
 (4) *La meteoro.* (novelo en "Tiaj ni estas" vol.3, 2002)  
 (5) *Ĉu rakonti novele?* (krimnoveloj, 1986)  
 (6) *Lasu min paroli plu.* (instrua romaneto, 1984)  
 (7) *La Dorsosako de Panjo Rut'.* (novelo, 1995)  
 (8) *Tien.* (sciencfikcia romano, 1997)  
 (9) *La kisa malsano* (instrua romaneto en "Tiaj ni estas" vol.2, 2002)  
 (10) *Tiaj ni estas.* (noveloj, 2002-2003)  
 (11) *Vivi estas miri.* (legolibro, 1995)  
 (12) *Dankon, amiko!* (facila rakonto, 1990)



NB – el la redaktejo : Ni tutkore dankas nian samcelanon kaj fidelan kontribuanton Joël GRANDJEAN, kiu siaflanke tiom mensfrape kaj sperte verkis la supran originalan omaĝon.

\*\*\* Joël GRANDJEAN - 55160 MESNIL-SOUS-LES-CÔTES



NB – El la redaktejo de « La Informilo » - Inter la multnombraj omaĝoj, kiuj alvenas el la tuta mondo, ni elektas la ĉi suban, kiun verkis, certagrade je la nomo de ĉiuj francaj esperantistoj, nia samideano Jean-Louis TEXIER

Mi ĵus eksciis tra mesaĝo de niaj amikoj el Norda Federacio pri la morto de Claude Piron. Indas atenti minuton pri tia esperantista "elito" (kvankam tiu vorto ne plaĉas al kelkaj).

Al lia edzino kaj familio kutkoraj kondolencoj "el la profundo de mia koro".

Mi ofte renjontis lin eĉ familie kun S-ino Texier, kaj evidente universalkongrese. Fora tikla memoraĵo estas familia kunfotografio okaze de la kongreso de Lucerno, kiam lia familio kaj nia paro okaze de ekskurso entenatis ĉiujn en la kavo de larĝa arbo.

Claude kaj lia edzino, ankaŭ kun niaj nordfederaciaj geamikoj estis renkontitaj en 2005 en la kongreso de Bulonjo ĉe Maro (ni estis ĉe sama hotelo). Ni multe akordiĝis pri evoluo de la esperanto-movadoj en la mondo, kaj li alportis al niaj filozofioj sian senton de singarda analizo ŝuldita al plurjarde kaj paralelaj respondecoj, li en la mondo de esploro, de pripensado, de porstudaj konsiloj kaj evidente de libroverkado kaj... mi mem pli modeste en tiu de grava asocio, kia estas Esperanto-France.

Ni plurfoje interretis sed ni ja havis lastajn interŝanĝojn antaŭ 10 tagoj, koncerne ĝenevan sperton de esperantistoj por diskonigi nian aferon; li klarigis al mi sian opinion, kaj kiamaniere aliloke en la mondo fortaj asocioj povas tiel trati la murojn de indiferento.

La esperanto-movado estas riĉa ne nur je dinamikaj instruantoj, kaj propagandistoj. Claude estis siafaka kaj siasperte nemalhavebla, malfacile anstataŭebla ŝtono, el kiuj ni pli kaj plu bezonos por aspekti firmaj kaj fortaj por defendi niajn valorojn.

"Le Monde De L'Espéranto" ĵus rekopiiis unu el liaj pli oportunaj disertacioj koncerne nian lingvon kaj ties rilaton al la fermitaj okuloj en la universo. Dankon, Claude, pro tiu testamenta verko.

Estas la momento atentigi ĉie en niaj grupoj kaj kursoj pri la amplekso de liaj ĉu tiklaj, ĉu seriozaj romanoj aŭ fantaziaĵoj, estus digna omaĝo uzi ilin jam por praktikigi esperanton inter ni kaj la diversaj generacioj. "Ni frandu piron ree kaj ree!"

Jean-Louis TEXIER

## Mesaĝo de S-ro Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008



La jaro 2008 estas proklamita *Internacia Jaro de Lingvoj* fare de la *Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj*. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj. La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktoro por antaŭeniri al daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de *Edukado Por Ĉiuj* (EPC) kaj la *Jarmilajn Evoluigajn Celojn* (JEC) aprobitajn de *Unuiĝintaj Nacioj* en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato (JEC1), dum kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo ili estas ankaŭ nepraj por atingi universalan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al naturmedia plutenoblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikite en la *Univĝersala Deklaracio pri Kultura Diverseco de Unesko* kaj ĝia *Agoplano* (2001), la Konvencio por la *Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo* kaj la *Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimoj* (2005).

Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj -- malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon -- forestas el la edusistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj. Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la ciberspaco aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la ekonomio, inter la lingvoj kaj scioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo "*lingvoj gravas!*" estu diskonigata ĉie.

Tiukuntekste, la 21-a de februaro kiel dato de la naŭa *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo* havos elstaran signifon kaj estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon, sur la nacia, regiona kaj internacia niveloj, pri la graveco de la lingva diverseco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la ciberspaco kaj komerco.


La *Internacia Jaro de Lingvoj 2008* alportos unikan ŝancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj celoj.

Koïchiro Matsuura

---

## Universala Kongreso / ROTTERDAM

14 / 26-ajn de julio 2008



1365 aliĝintoj ( je la 20a de marto ) inter kiuj  
184 Francoj



## “Au pair” parolas Esperanton kun infanoj

Ni vivas en franca regiono proksima al Germanio, kie la loĝantoj estis dulingvaj antaŭ la dua mondmilito. Pro la franciĝo, nuntempe oni devas batali por starigi dulingvajn lernejojn. Nur 7 % de la infanoj havas nuntempe tiun ŝancon. Kiam ni konsciiĝis pri tio, nia plej aĝa filino jam havis kvin jarojn kaj la dua havis du jarojn. Ni do decidis kalkuli nur pri niaj fortoj por dulingvigi niajn infanojn, kaj ni elektis Esperanton kiel hejma dua lingvo.

Tri jarojn poste, ni kvinopas kaj al la bebo mi parolas nur esperante, sed la du plej aĝaj iras al nur franca lernejo, vivas en kvazaŭ nur franca medio, kaj ne tiom multe aŭdas esperanton. Nur iomete ĉiutage. Vojaĝi al Esperantio estas kosta, ĉirkaŭ 300 eŭroj por dutaga semajnfino, ĉefe al Germanio ĉar en Francio, laŭ ni, oni tro ofte krokodilas. Des pli kiam la plenkreskuloj kredas, ke la infanoj ne komprenas, kaj alparolas ilin france. Kiel do vi kredas, ke juna infano klopodos poste paroli iun ajn lingvon ol la sia? Ankaŭ mia edzino lernas Esperanton, nur kiam ŝi aŭdas min paroli al la bebo. Kiel do aktivigi ĉiujn dum longa tempo?

### Esperantlingva “Au pair”-junulino

De longe ni pensis gastigi knabinon kiel “Au pair”, samranga, ĉe ni. Ĉar ni estas francoj, ni devas sekvi la Strasburgan interkontrakton pri “Au pair” subskribita en 1969. Tiu traktato devigas nin gastigi junan francparolantan knabinon en unuopa ĉambro, pagi poŝmonon po 250 eŭroj monate, ebligi kaj pagi kursojn en la franca lingvo. Kutime, tia loĝado estas interesa en grandaj urboj, kaj la traktato celas protektadon kontraŭ konkureco al hejmaj laborantoj. Kontraŭe, “Au pair”-knabino ne

bezonas

laborpermeson kaj ne havas salajron. Pro tio oni pagas socian asekuron laŭ kalkulmetodo, kies malfacileco estas tipe franca. Do simpla “Schengen” vizo ebligas trimonatan restadon, kaj interrete, mi iam legis pri somera “au pair” aranĝoj, kiuj ne devigas sekvi kursojn. Nuntempe, mi dubas, ke tia ebleco vere laŭleĝas, ĉar mi neniam retrovis informon pri ĝi.

Tamen, ni decidis gastigi knabinon, kiam aperis [eklaboru.com](http://eklaboru.com), ĉar ni pensis, ke eblis trovi iun esperantiston por havi tutan monaton en Esperantio por la prezo de nur semajnfino. Ni, pravis. Post du tagoj, ni ricevis proponon de Nian Peng el Ĉinio por restado okazonta en septembro.

### Spertoj de la familio Hurstel

Tiun monaton, uzado de esperanto draste kreskis inter ni, eĉ se la infanoj bezonis nur unu tagon por malkovri, ke Nian komprenas la francan. Tamen, Annaïs, la plej aĝa, pli kaj pli ofte parolis esperante kaj povis enmiksiĝi en la plenkreskulajn diskutojn ĉirkaŭ la tablo. Maureen, la dua, parolis, nur kiam ŝi solis kun Nian, sed ŝi kutimiĝis al pli intensa uzado de fremda lingvo. Ŝi nun ĝoje lernas la germanan en la lernejo, kaj eĉ ŝatis spekti filmojn en la ĉina kun Nian.

Al tiuj kiuj ŝatus provi la samon, ni konsilas: kutimiĝu al uzado de esperanto por la ĉiutaga vivo, ĉefe se la infanoj ne denaskas. Unu monato estas bona provo por via hejmo, ĉar oni neniam certas, ke la aldonado de alia membro de la familio glatos. Interkonsentu kun iu, kiu ne bezonas vin por sia vizo. La afero estas jam sufiĉe kompleksa.

Cyrille HURSTEL

### Spertoj de Nian Peng

Meze de aŭgusto, mi laboris ĉe sinjoro Cyrille Hurstel kiel “Au pair”. Mi pasigis mian specialan monatan someron ĉe ili. Ĝis nun, mi kelkajn fojojn ankaŭ renkontis la tri mirindajn knabinojn en miaj songoj.



## EKLABORU!

Lastjare, mia patro hazarde legis paĝon [www.eklaboru.com](http://www.eklaboru.com) en interreto. Kaj “Au pair”, iu nova nomo de laboro altiris lin. Post nia ekkono pri kio estas “Au pair”, mi decidis mem proponi min. Kaŭzas ke mi volas vojaĝi al Germanio post mia agrabla vojaĝo de antaŭ tri jaroj, unue mi skribis al iu germania familio, sed bedaŭrinde eble ili

jam trovis aŭ eble mia kondiĉo ne taŭgis, mi ne ricevis respondon. Vere, tiam mi estis iom elreviĝinta, sed la ŝancon ĉiam mem venas kiam vi preskaŭ forgesis ilin. Dua hazardo okazigis mian Obernai-a somero. Ankaŭ orienta Francio interesas min, en miaj tri francaj vojaĝoj, mi neniam estis tie, finfine dank’ al tiu laboro “Au pair”, mi povas viziti ankaŭ tiun parton, perfekte!

Gesinjoroj Hurstel estas tre viglaj, ili ofte faras ion, kio multe tuŝas mian koron. Ĉefe nun el miaj memoroj. Kiel nia antaŭkontakto, ili aĉetis la bileton por veturi al Strasbourg el Plouezec por mi, sed mi devis ŝanĝi la stacidomon en Parizo, kiam mi mem zorgas kiel aĉeti la metroan bileton mi

mirinde trovis ke en la koverto akompanas du metroaj biletoj, kaj post la klarigo de apuda sinjoro, mi komprenis ke la du diversaj koloraj biletoj estas nova kaj malnova, eble oni ne plu povas uzi la malnovan bileton nun. Ili preparis du biletojn por antaŭ solvi ĉiujn eblecojn. Tuj mi varme sentis!

Fakte, mi ne vere laboras kiel “Au pair”, ili min traktas kiel la kvara filino, sola tasko de mi estas devigi la infanojn paroli esperanton. Mi ĉiam devas paroli esperanton kun ili kiel nia natura lingvo. Mi ne povas kompari kun antaŭe, sed laŭ la vortoj de gesinjoroj Hurstel, la infanoj bone adaptiĝis al esperanto en la vivo. Ankaŭ mi

trovas amuze, kvankam ili scias ke mi parolas francan sed ili aŭtomate esperantis kun mi, eble finfine, mi estas fremdulino por ili. Kun la infanoj, mi ankaŭ bone lernas francan, mi aŭdis iliajn interbabiladojn, mi legis liajn librojn kiuj taŭgas mian francan nivelon, ktp. Dum la semajnfino, ili ofte planis ion programon por mi, mi neniam enuis ĉe ili, estis tre riĉa ferio.

Dank’ al [eklaboru.com](http://eklaboru.com) kaj gesinjoroj Hurstel aŭ dank’al mia patro kaj mia mempropono, mi ne scias. Sed mi kredas ke tio estas la *antaŭdestinita altiriĝemo* kiel la ĉinoj ofte diras.

Nian PENG

el *Familia Esperanto* n-ro 48

## Komuna lernolibro pri Azia Moderna Historio

Kiel raportite en la protokolo de la lasta 2006 UEA komitato-kunsido, la Esperanto-versio de la komuna lernolibro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, estas eldonita. Ĝi estis havebla dum la UK en Jokohama. La projekto estis programero de *Kleriga Lundo* dum la UK.

42 volontulaj pacamaj esperantistoj el la tri landoj partoprenis en la tradukado de la tri-lingva lernolibro en Esperanton.

La libro estas eldonita de **Ĉina Fremdlingva Eldonejo**. La libro montras praktikan utiligon de Esperanto en tiklaj historiaj libroj.

Jen la enhavo de la libro: *Historio por Malfermi la Estontecon - Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio*

= Enkonduka Ĉapitro: La Tri Landoj antaŭ la Malfermo

= Ĉapitro I - Malfermo kaj Modernigo

= Ĉapitro II - Ekspansio de la Japana Imperiismo kaj la Rezistado de Ĉinio kaj Koreio

= Ĉapitro III - La Invadmilito kaj la Damaĝo al la Popolo

= Ĉapitro IV - Orientazio post la Dua Mondmilito

Fina Ĉapitro - Taskoj por Paco en Orientazio en la 21-a Jarcento

Kronika Tabelo de la Moderna Historio de Ĉinio, Japanio, Koreio

LEE Chong-Yeong [lee ĉe esperanto.net](http://lee.ĉe.esperanto.net)

## lastan minuton ...



### 27 svisaj parlamentanoj subskribis leĝproponon favore al Esperanto

La poutuke altnivela apogo al Esperanto: la Nobelpremia kandidatigo de UEA fare de svisaj parlamentanoj ( en novembro 2007 ) havas tre pozitivajn sekvojn en Svislando. Aperis politikistoj ? kiuj deziris fari ion por Esperanto. Rezulte de pretiga kunlaboro inter SES ( ĉefe Mireille Grosjean ) kaj la iniciatintoj, Esperanto povus ricevi plian subtenon, agnoskon je ŝtata nivelo.

Antaŭ kvin tagoj, la 21-an de februaro en 2008, leĝpropono estis submetita en la kantonon ( ŝtato ) de Neŭŝatelo kun subskribo de 27 parlamentanoj el diversaj partioj. La leĝpropono listigas interalie tiujn punktojn: ŝtatnivele informadi pri esperanto, utiligi ĝin en diversaj oficialaj dokumentoj ( tradukoj ), en turismo loka ( prospektoj ), ebligigi kaj subteni la instruadon de la lingvo laŭ nedeŭiga formo.

Gazetara konferenco okazos en CDELI la 4-an de marto 2008 kun kelkaj el la 27 deputitoj, kun la ĉesto de Mireille Grosjean, kunprezidantino, kaj Stefano Keller, sekretario de Svisa E-Societo, SES. Detala raporto kaj traduko de tekstoj aperos post la konferenco.

Franclingva artikolo pri la evento legeblas jam tie: <http://uri.fi/JD/> La Esperanta versio baldaŭ aperos.

Larĝskala dissendado de gazetara komuniko sciigas la svisan ĵurnalistaron, amaskomunikilojn pri la evento.

Stefano Keller, SES  
[stefano@kontakto.info](mailto:stefano@kontakto.info)





## Mulhouse-Esperanto kaj ties aktivecoj

En oktobro 2007, komence de la lerno-jaro ekfunkciis la Esperanto-kursoj en La Kulturdomo Espace 110 en Illzach apud Mulhouse. Ĝia ampleksa broŝuro anoncis la Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresantoj, marde kaj jaŭde vespere de la 18a30 ĝis la 20a. Thomas Heinis pretis gvidi la kurson por komencantoj. Tamen malgraŭ kelkaj komunikoj en la lokaj gazetoj, ne eblis ekfunkciigi la kurson por komencantoj. La kurso por progresantoj tuj povis komenci kun 4 gelernantoj. Ni uzas la libron de Paul Gubbins "Kunvojaĝu", kiu taŭgas por la diversaj niveloj de niaj gelernantoj. Ĝin gvidas André Grossmann.

La kultur-domo Espace 110 estas la sidejo de nia asocio, kie ni povas organizi niajn kunvenojn, festetojn, ktp.



La 18an de oktobro 2007 Kimie Markarian vizitis la elementan lernejon de Baldersheim. Ni estis favore akceptita en du klasoj CP (unua klaso) kaj CM2 (kvina klaso). Tie Kimie prezentis la principon de Sorobano. Ŝi disdonis al ĉiuj infanoj soroban-ekzercojn, simple por ekzerci legadon de la sorobano. En CM2 la infanoj jam pli facile komprenis la principon kaj eĉ sukcesis kalkuli per ĝi.

Ĉe la fino ni ankaŭ povis prezenti Esperanton en la klaso CM2 al entuziasmigitaj gelernantoj.

En 2007 estis la vico de Mulhouse-Esperanto por organizi la Zamenhof-feston por la tri grupoj el Frajburgo, Mulhouse kaj Bazelo.

Ni organizis ĝin la 15an de decembro en Rixheim (apud Mulhouse). Ni proponis al la partoprenantoj, unue viziti la tapeto-muzeon kaj la Kristnasko-bazon, kiu oportune okazis en tiu tago.

En restoracio "Au Cygne" disvolviĝis la cetero de la festo kun prezentado de fotoj pri UK en Jokohamo, pri nova projekto de TAKE en Brazilo "Plantu por nia planedo". Frédéric mirigis la ĉeestantojn per siaj magiaj talentoj. La vespero finiĝis per alzaca specialaĵo, nome "Bekaofa", kiujn plej multaj elektis kaj frandis.



La retejo <http://mulhouse.esperanto.free.fr> informas pri niaj aktivecoj kaj ankaŭ pri tiuj de **Esperanto France-Est**, pri ĝiaj staĝoj organizitaj en Francio kaj Germanio kaj disponigas aktualigitajn elŝuteblajn dokumentojn. En ĝi troviĝas pluraj ligoj al aliaj gravaj kaj allogaj retejoj.



Mulhouse-Esperanto regule eldonas sian tri-monatan bultenon **Sud-Rejna Kuriero**, komuna al la grupoj de Bazelo kaj de Mulhouse. Aperas ĉefe tekstoj en Esperanto sed ankaŭ en la germana kaj en la franca.

La 10an de januaro 2008 anstataŭ nia kurso por progresantoj, okazis nia unua kunveno de la jaro por kune festi la tri reĝojn. Ni havis la plezuron refoje akcepti nian fidedan gaston el Germanio, nome Konrad Gramelspacher.

Ni surtabligis 4 grandajn migdalo-tortojn, bongustan alzacan vinon kaj sukcon.

Pro la hazardo de la 4 tortoj elektiĝis 2 reĝoj kaj 2 reĝinoj. Ni kune tostis je la nova jaro kaj je la sukceso de Esperanto en agrabla kaj amika etoso.

... ni enpartoprenu ! ...




Laŭ peto de iu fak-komisiono, la loka klubo ellaboris agad-programon, kiu ŝoviĝos en tiun preparitan de la urbo, okaze de la tiel nomata « **Eŭropa Monato** ». Memkompreneble, enpartopreno de multaj esperantistoj el la regiono iĝus konkreta pruvo de la vivoforto de esperanto...

= Dimanĉon, 4an de majo, de la 22a ĝis la 22a, *auditorio de la MJC Desforges, 27 rue de la République*

#### **Koncerto de JoMo**

= 7an, 9an, 10an, 13an, 14an, 15an... *Salono Chepfer (urbdomo)*

#### **Ekspozicio – Ludoj Eŭropo amuziĝante – Esperanto, justa lingvo**



= Sabaton, 10an de majo, de la 14a ĝis la 16a ... *Salono Chepfer*

#### **Prelego de A. Cherpillod: "Kiu lingvo por Eŭropo morgaŭ?"**

Samtage, de la 22a ĝis la 22a... *Salono Chepfer*

#### **Prelego de Sean Ó Riain : " Esperanto, amiko aŭ malamiko de la plurlingveco ?"**

= jaŭdon, 15an de majo, de la 19a30 ĝis la 20a30... *Salono A Warhol de la MJC Desforges*

#### **Prelego de M. Delforge : " La historiaj lokoj de Belgio"**

Samtage, de la 20a30 ĝis la 22a... *MJC Desforges*

#### **Koncerto de la koruso "La Cantalud'"**

## **Programme Mai 2008 = Esperanto Nancy 54**

**Concert donné par JoMo**, artiste Toulousain, en différentes langues

- Dimanche 4 mai de 20 h à 22 h :
- Auditorium de la MJC Desforges, Rue de la République

#### **Exposition – Animations Joux**

- salle Chepfer ( hôtel de ville ) du 8 au 15 mai
- Salle Chepfer de l'Hôtel de ville

**Conférence de A Cherpillod** « *Quelle langue pour l'Europe de demain ?* »

- Samedi 10 mai de 14h à 16 h, Salle Chepfer de l'Hôtel de ville

**Conférence de S .ORian** : « *L'espéranto : ami ou ennemi du plurilinguisme?* »

- Samedi 10 mai de 20 h à 22h
- Salle Chepfer de l'Hôtel de ville

**Conférence de M Delforge** « *Les lieux historiques de Belgique* »

- Jeudi 15 mai de 19 h 30 à 20h30
- Salle A Warhol, MJC Desforges, rue de la République

#### **Concert donné par la chorale « La Cantalud'»**

- Jeudi 15mai de 20h 30 à 22h
- MJC Desforges, rue de la République

Les conférences précitées destinées à tout public ont lieu en français

Conférence d'A. Cherpillod**Quelle langue pour l'Europe de demain?**

On nous rebat les oreilles avec la construction de l'Europe .Ce n'est pas d'hier. En 1812, Napoléon disait déjà :  
*« Il nous faut un code européen, une cour de cassation européenne, une même monnaie, les mêmes poids et mesures , les mêmes lois »*

**Mais cette Europe, quelle langue parlera-t-elle ?**

A grand renfort de publicité, on prône une solution miracle : le **plurilinguisme**. Il faudrait que chaque Européen parle au minimum deux ou trois langues européennes, voire davantage. Quand on constate les résultats minables que donne l'enseignement de l'anglais, on touche du doigt le caractère ridicule de cette utopie.

Et quand un Hongrois ayant appris l'anglais et le russe, rencontrera un Suédois parlant l'allemand et l'espagnol, si ces deux individus prennent comme arbitre un Grec qui a passé des années à maîtriser les difficultés du français et du polonais , quel sera le résultat ?

**Alors, quelle langue pour l'Europe de demain ?**

Une langue réellement internationale.


Elle existe .Ce n'est pas une langue qu'on bredouille au bout de six ans d'étude, c'est une langue qui permet une utilisation en **six mois** .Et elle est **aussi riche** que n'importe quelle langue nationale.

André Cherpillod est écrivain , membre de l'Académie d'espéranto, auteur d'un dictionnaire étymologique de l'espéranto.

Conférence de S. ORian**L'espéranto: ami ou ennemi du plurilinguisme?**

Diplomate irlandais détaché à la Commission européenne, Seán Ó Riain, a soutenu sa thèse de doctorat sur la planification et la politique des langues en Irlande et au Québec. Pendant 28 ans, il a occupé des postes au service diplomatique d'Irlande en Autriche, en Australie, en Pologne, en Allemagne et à la Représentation Permanente d'Irlande auprès de l'Union Européenne à Bruxelles.

A partir de septembre 2007 il travaille à la Commission pour consolider le nouveau statut de la langue irlandaise comme une des langues officielles de l'Union Européenne. Il s'est engagé dans la défense du multilinguisme et surtout du potentiel de l'Espéranto à améliorer et accélérer l'apprentissage des langues en général. Il est président de l'Union Européenne de l'Espéranto."

La Cantalud'

La Cantalud', née en 1986, regroupe une quarantaine de choristes Ludreëns ou voisins, hommes et femmes, d'âges et d'horizons différents, désireux de se regrouper autour du chant choral.

Appartenant au mouvement 'A CŒUR JOIE' \*\*\*, elle adhère pleinement à ses objectifs qui sont de faire chanter le plus grand nombre de personnes autour de musiques les plus variées, dans un souci de constante qualité.

Dans le cadre du mois de l'Europe, la Cantalud', invitée par l'association Espéranto Nancy 54, présente des chants de son répertoire et l'**hymne européen en espéranto**.

\*\*\* Depuis l'origine en 1940, se perpétue cet élan qui a fait d'A Cœur Joie un Mouvement qui s'étend sur toute la francophonie et dans bien d'autres pays,



Angeva Folio = No 8 Paço 3

**Pensées de voyage - Vojaĝpensoj**

Le car, ça pollue, mais c'est pratique pour traverser l'Europe, jusqu'en Pologne, quand les trains ne circulent pas (au mois de novembre 2007, grèves des cheminots en France et en Allemagne !). Donc un dimanche de bon matin, me voilà attendant le car à Angers. Il arrive, conduit par un chauffeur, apparemment espagnol, qui nous demande immédiatement qu'on lui parle... en anglais !

Quelques heures plus tard, nous arrivons à Paris, changeons de car et le nouveau chauffeur... parle polonais ! A la frontière germano-polonaise, les douaniers, bien sûr, ne parlent pas la langue de Molière ! Donc, à chaque fois, du temps perdu en vaines gesticulations pour essayer de se faire comprendre, pour obtenir quelques bribes d'informations ! Bref, le voyageur résigné que je



suis, constate ainsi, sur le terrain, le résultat de dizaines d'années d'apprentissage des langues en Europe, des milliards d'euros presque gaspillés en pure perte et qui n'auront pas été investis dans l'enseignement d'autres matières, dans le social, dans la santé,... alors qu'en quelques mois, il serait si simple de bien communiquer

avec l'espéranto. Enfin, je le savais déjà et donc je garde l'espoir : cela prouve que l'espéranto a toute son utilité et quand un homme politique honnête ( oxymore ?! ) aura le courage de proposer l'espéranto, les citoyens émerveillés se demanderont pourquoi cette décision n'a pas été prise plus tôt

Aŭtobusoj poluas, tamen estas oportunaj por traveturi Eŭropon, ĝis Pollando, kiam la trajnoj ne cirkulas ( en novembro 2007 okazis fervojistaj strikoj en Francio kaj Germanio ! ). Do, iun dimanĉan frumatemon, jen mi atendanta aŭtobuson en Angers. Ĝi alvenas, kondukita de ŝoforo ŝajne hispana, kiu tuj petas nin alparoli lin... en la angla !

Kelkajn horojn poste, alveno en Parizon, aŭtobus-ŝanĝo kaj la nova ŝoforo... parolas pole ! Ĉe la german-pola landlimo la doganistoj, memkompreneble, ne parolas la lingvon de Molière ! Do, ĉiufoje, perdita tempo pro vana gestumado por provi sin komprenigi, por ricevi kelkajn informerojn ! Resume, la rezignaciinta vojaĝanto, kiu mi estas, tiel konstatas en reala vivo, la rezulton de jardekoj da lingvo-instruado en Eŭropo, miliardoj da eŭroj preskaŭ plene malŝparitaj, kiuj ne estis utiligitaj en instruado de aliaj fakoj, en sociaj servoj, en prisanaj servoj... dum en nur kelkaj monatoj, estus simplege bone komuniki per Esperanto. Nu, fakte, tion mi jam sciis kaj do mi plu esperas : tio pravas, ke Esperanto plu plene utilas kaj kiam honesta politikisto ( oksimoro ?! ) ekkuraĝos proponi Esperanton, la mirplenaj civitanoj demandos sin, kial do ne pli frue decidiĝis tio...

Laurent Vignaud

... en nia rubriko... *Esperanto, interkultura lingvo* ...



Laŭ la rubriko "Laste aperis" de la revuo "Esperanto", en la pasinta jaro surmerkatigis **184 libroj**, iom malpli ol averaĝe, tamen ili estis pli ampleksaj, kaj la paĝosumo -31 183 paĝoj- estas la plej granda post 2001. Inter la eldonistoj plej supras slovaka esperantisto *Stano Marček*, kiu eldonis 11 diverslingvajn versiojn de sia *rekta-metoda lernolibro*.

Ĉi tiujn kaj aliajn interesajn faktojn oni povas legi en la statistika revuo "Nia libroproduktado en 2007", verkita de ruslanda ĵurnalisto *Aleksander Korĵenkov*. Lia teksto, aperinta en la februara kajero de "La Ondo Esperanto", estas legebla en la retejo de "La Ondo" <http://www.esperanto.org/Ondo/> en la rubriko "Novaĵoj".

[La\_Balta\_Ondo]

RU-236039 Kaliningrad ab. ja. 1205, Ruslando

Rete: [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

Eo: <http://www.esperanto.org/Ondo/>

Ruse: <http://users.gazinter.net/sezonoj/>

Dissendolisto: [http://groups.yahoo.com/group/La\\_Balta\\_Ondo/](http://groups.yahoo.com/group/La_Balta_Ondo/)

Telefono: (4012) 656033

"Robinsono Kruso" en MP3



Estas finfarita kaj mendebla nova **sonlibro**, registrita en la formato MP3.

Ĉi-foje tio estas "**Robinsono Kruso**". Temas tamen ne pri la originala teksto, sed pri ne malpli fama instrucela rerakonto, esperantigita de *H. J. Bulthuis* en 1920-aj.

La registraĵoj estas plenumitaj en la stilo de *radiospektaklo*, do, kun akompanaj sonoj, kiam tio necesas, kiel ekz. pafoj, marplaŭdoj, fulmotondroj ks.

Krom la sonoj, la KD enhavas ankaŭ la tekstajn versiojn de la romano, en diversaj formatoj. Estas aldonitaj ankaŭ kelkaj elektronikaj vortaroj.

La disko havas koloran kovrilon, HTML-menuon. Voĉlegis la tekstojn kaj preparis la diskon mi.

La disko estas havebla ĉe pli grandaj libroservoj, ekzemple ĉe:

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7822>

Amike,

*Andrej Grigorjevskij* [grigorjevskij@yahoo.co.uk](mailto:grigorjevskij@yahoo.co.uk)

... pri giganta verkaĵo ...



Dank' al la 14-jara malfacila kompilado de *Wang Chongfang* kaj fervora subteno de ĉinaj esperantistoj la **Granda Vortaro Ĉina-Esperanta** eldoniĝis en Ĉinio, en decembre 2007, omaĝe al la centjara jubileo de enkonduko de Esperanto en Ĉinion.

La vortaro kun pli ol mezgranda amplekso nombras **1248 paĝojn** kaj entenas pli ol **71 800 ĉefajn artikolojn** (inkluzive de **5 600 artikoloj** kun unuopa ideografikaĵo) kaj pli ol **27 400 subordigitajn artikolojn**, t.e., ĝi havas en si entute ĉ. 100 000 artikolojn kaj la totala nombro de la vortoj en ĝi atingas ĉ. 4 989 800.



La vortaro karakterizas sin per kvar trajtoj: granda amplekso, multeco de entenataj novaj vortoj kaj esprimoj, abundeco de ekzemploj kaj kiel eble plej preciza kaj flua stilo de la Esperantaj tradukoj.

Ĝi servas ĉefe al ĉinaj esperantistoj, kiuj studas Esperanton aŭ uzas Esperanton en verkado aŭ tradukado, kaj ankaŭ al ordinaraj Esperanto-lernantoj kaj eĉ al alilandaj esperantistoj, kiuj lernas la ĉinan lingvon pere de Esperanto.

Tiu, kiu volas havi la vortaron, kontaktiĝu kun la *Guangdong-a Esperanto-Asocio* laŭ jenaj retadreso:

[espe@vip.sohu.com](mailto:espe@vip.sohu.com) - [gziwz@21cn.com](mailto:gziwz@21cn.com) - [agadu@126.com](mailto:agadu@126.com)

## 400.000 poloj ricevos Esperanto-kurson ...



En septembro 2008 ĉiuj legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo *Gazeta Wyborcza* ricevos kun la gazeto ankaŭ *kompakt-diskon kun kurso de Esperanto* kaj ampleksa prezento de la Esperanto-movado. La diskon laŭ mendo de la urbo *Bjalistoko*, produktos la teamo de **E@I** (*ikso.net*), kaj la eldonon financos la urbo mem.

La eldono de la disko estas parto de granda informa kampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo *Bjalistoko* lige kun la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof en 2009.



## Programme Mai 2008 - Esperanto-Nancy 54 ( suite de la page )

### Conférence de M. Delforge ( Charleroi)

- Jeudi 15 mai, 19h30 à 20h30,
- Salle A. Wwarhol, MJC Desforges

### Présentation de lieux historiquement importants en Belgique

#### Préhistoire

- Bernissart : *squelettes d'iguanodon*
- Spiennes : *mine préhistorique*
- Spy : *grotte du Néandertal*
- Tongres *musée*

#### Période romaine

route de Bavai(F) , Tongres(B) et Akeno(D) Glimes (Incourt) Tumulus

#### Période médiévale

Bruges , Limbourg, Binche, Veurne, Namur, Bouillon château de Godefroy , Beersel, Gaasbeek (châteaux)  
Zoutleuw église médiévale

Franchimont : château d'où partirent les 600 hommes qui se battirent contre Charles le Téméraire et Louis XI

La Belgique , terre de batailles de 1693 à la deuxième guerre mondiale

pour vous initier à la seule  
vraie langue  
internationale, pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto...



**nos stages, nos congrès,  
nos rencontres, nos voyages...**





## "Komune festi la Novan Jaron" / 6a Novjara Renkontiĝo – Germanio

Por ĝui agrablan etoson kun samideanoj, mi elektis la 6an "NR", kiu okazis en **Bestwig** ( fakte en Fö ckinghausen ), urbo en nord-okcidenta Germanio, inter la 27a de decembro 2007 kaj la 3a de januaro... Mi iris trajne ( malfacile ) sed feliĉe revenis per auto.

Mi ja trovis tie, kion mi deziris: amikecon, agrablan libertempon, interesajn kaj amuzajn vesperojn, danc-eblecojn !

Do, mi tre ŝatis la etoson kaj la programon... kaj tie -plue-, nur ekstere fumis la kelkaj "gefumemuloj" !

Mi jam informiĝis pri la venonta "NR", por denove enpartopreni ! ( ankoraŭ ne certas la loko, ĝi povus okazi apud Frankfurto ). Ankoraŭ pli agrablos, ĉar mi retrovos konatulojn.

Jes, mi tre ŝatis la restadon, pro la mensa ripozo, ( kvankam oni ankaŭ povis paroli pri seriozaj problemoj ), pro la amikemaj rilatoj, la diversaj belaj momentoj, la riĉa programo.

Mi ankaŭ bone ridis, kiam okazis la magia vespero ; venis 7 homoj el alia germana regiono, kun tre diversaj mirindaj prezentaĵoj... ni ĉiuj sentis nin kiel feliĉaj infanoj... Ili parolis esperante!

En Föckinghausen kuniĝis 150 homoj, el kiuj pli ol 50 gejunuloj aŭ infanoj. Plej multis familioj, kiuj kutime partoprenas NR ! Mi iris sola, sed trovis tie multe da okazoj por interparoli kun sufiĉe da malfermitaj homoj! La junuloj havis propran programon, kaj tempon por babili inter si, ludi, renkonti la gepatrojn, ĉefe ĉetabele.

Mi opinias, ke la plej aprezata sekvenco estis filmado... Mi observis iom ilin, filmantaj, seriozaj kaj ridemaj... Ili ludis kaj muntadis, kaj poste montris al ĉiuj la rezulton. La

infanoj disponis je multegaj ludoj kaj spacoj, kaj preparis teatraĵon, prezentita je la fino de la aranĝoj. Kelkaj gepatroj helpis, kaj partoprenis.



La aluditaj geknaboj aspektis tre ĝoiaj... Tie, ili travivis grandan parton de la tago inter si, kaj ĝenerale revenis al la gepatroj dum la manĝoj ( ne ĉiuj ) kaj dum la nokto... ankaŭ por kune ludi kun ili !.

Kion mi faris dum la tago? Mi elektis tion, kio plej allogis min, laŭ la programo. Kelkajn kursojn mi ĉeestis: unu por pli bone paroli tiun mirindan internacian lingvon, kurso gvidata de Gunther: li provis ekzerci nin pri la akuzativo, pri *ŝi* ( aŭ *si* ), *li*, ktp

Mi enpartoprenis atelieron pri malstreĉiĝo kun Anna, mi provis danci *salsan* kaj

*polonezon* ! Ankaŭ trejnado por pli bone "voĉlegi" iĝis tre interesa ( mi mem instruas pri tio, sed oni ĉiam povas pliboniĝi ! ).

Aldoniĝis longa agrabla promenado tra la proksima arbaro. Mi havis okazon ĉeesti ankaŭ multe da aliaj ofertoj, sed ankaŭ ŝatis ofte viziti la libroservon por legi, songi, babili, au aĉeti !... Centoj da libroj atendis nin !

**Pri la vesperoj...** Vendredon, *JoMo* koncertis ; sabaton, spektaklo de la magiisto ; dimanĉon, muzika vespero ( partoprenantoj ludas aŭ kantas por ĉiuj ! ); lundon, lasta tago de la jaro... "silvestra" festo ! Mardon, la unuan de januaro 2008, ni ĝuis teatraĵon far la infanoj... "*Al kiu apartenas la ĉielarko ?* " kaj fine la "internacia vespero" merkredon !.

Ĉion rakonti mi ne povas... mi esperas, ke vi kapablos iom imagi mem... aŭ konsulti la raporton \*\*\*.

Nun, mi provos baldaŭ ĉeesti denove alian E°-renkonton, pro la ĝuinda etoso -kvazaŭ ideala socia etoso laŭ mi-, por ne perdi la lingvajn progresojn sed ankaŭ pro la varma amikeco kaj memevidente por daŭrigi la lernadon !





Mi nepre aldonu, ke LU, certagrade "generalala" responsulo, dediĉis sian tutan tempon por sukcesigi la eventon, en la sino de skipo, kies membroj ankaŭ alportis daŭre helpon diversmaniere kaj ĉiam akurate.

\*\*\* temas pri aparta raporto redaktita de la ĉef-organizanto, *Lu Wunsch-Rolshoven*

<http://www.esperantoland.org/eo/plu.php?msgid=965>

Ampleksan « fototekon » vi ankaŭ povas malkovri sur la retejo

[http://www.esperantoland.org/noro6\\_bildoj](http://www.esperantoland.org/noro6_bildoj)

*Lydia BLOCH*  
FR– 55000 Bar-le-Duc



**BONJOUR, VOISIN !**

La 8-an de decembro okazis malkovriga aranĝo « Bonjour, voisin ! » omaĝe al Finnlando, sine de la esperanta grupo de Sarreguemines. Celo estis vekti intereson por popolo samcivitana en Eŭropa Unio.

Ne temis pri spektakla prezento.

La aranĝo disvolviĝis dum tri duonhoroj da prezento, per trikapa skipo de gvidantoj por geografia, historia kaj literatura kontribuo; plie muzikero de Sibelius kaj unu popolkanto konvene paŭzigis .

La literatura parto estis aparte aprecita. Aktorino deklamis tri peomojn de Edith Södergran, la poetino kiun elektis kaj proponis finnlantaj samideanoj. Ni havis aliron al ties verko dank'al la esperantlingva libro « Lando malekzista ».

Informtabulo, ornamita de ribambelo de flagetoj, proponis ankaŭ faldfoliojn pri Esperanto.

La aranĝo arigis la membraron de la esperanta grupo kaj deko da invititoj.

La nombro de ĉeestantoj ne laŭis niajn esperojn ! Aperas ke prefereblas prokrasti tian aranĝon komence de decembro, kiam malfermiĝas la enurbe kristnaska vilaĝo.

Ni plie spertis ke ĉiutrimestre antaŭvidita tia kunveniĝo troas. Preparado inkluzivas francigon de tekstoj, krom kolekto de dokumentoj.

Lasta kontentigaĵo : la urba mediateko akceptas kunlabori por faciligi tiajn kunvenojn akirante librojn de verkistoj el la elektita lando.

La venonta « Bonjour, voisin ! » okazos en majo. Ni tiam omaĝos al Slovenio, la lando kiu nuntempe prezidentumas la EU-on.



*Novjara pripenso*

*Antaŭ jaroj, ni loĝis proksime de ferindustria uzino.*

*Ĉiutage, kaj eĉ dum nokte, tie klopodegis eta lokomotivo por translokigi pezajn vagonojn. La klopodo estis vid- kaj aŭdebla de nia loĝejo.*

*Tiu maŝino ege suferis. Oni perceptis tion pro ĝiaj penigaj « ĉuk ! ĉuk ! ».*

*Tamen ĉiam la lokomotiveto venkis kaj ties « ĉukĉukoj » finfine rapidiĝis kaj gajsonis.*

*Brava lokomotivo, eta, kuraĝa, obstina, nelacebla fronte al laborstakego.*

*Ĝi estis modelo de gajnanto. Ĝi restas invito « ĉukĉuke » klopodi.*

*Armando.*

## Ekspozicio pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento



En la *Eŭropa Parlamento* en Bruselo la 30-an kaj 31-an de januaro, videblis ekspozicio pri la temo "Esperanto kiel perilo de translimaj junularaj kontaktoj".

La ekspozicio povis okazi pro subteno de *Ljudmila Novak*, slovena ano de la Eŭropa Parlamento. Ŝi mem lernis Esperanton en sia junaĝo, kaj plu simpatias al la lingvo, kvankam ŝi ne aktive parolas ĝin. La ekspozicion praktike organizis kaj financis *Eŭropa Esperanto-Unio*, kaj la inaŭguron ĉeestis *Sean Ó Riain*, prezidanto de EEU kaj irlanda

diplomato, kiu antaŭ nelonge estis taskita direkti la retan sekcion de la ĵus kreita irlandlingva tradukservo de la Eŭropa Komisiono.

# KULTURA SEMAJFINO de S.Ĝ.L.


23.11.2007 – 25.11.2007



ripozita, ĉar mi estis unu el la subjektoj por la demonstrado ( "eksperimentaj bestoj" ).

Kiel lastan jaron, mi ricevis invitleteron kaj aliĝilon al la *Kultura Semajfino de Sarlanda Esperanto-Ligo* en la domo *Kardinal-Wendel-Hau*, Homburg.. Mi nur bedaŭras, ke tiu aranĝo ne estis pli frue anoncita sur retpagoj ( *TEJO-kalendaro*, *Mulhouse-esperanto*, *verda krabo*, ktp....)

Proksimume tri dekoj da ĉeestantoj tamen ĝoje ĝuis instruajn prelegojn. La temo estis *Paŝon post Paŝo al plena bonfarto*. Ili venis de Francio, Germanio, Luksemburgio, Hungario. Mi aŭskultis *Martins THORENZ* pri "REIKI", japana san-metodo ) kaj provis iomete ĝian efikon. Mi vekigis post duonhoro, tute



Ĉu vi konas ĉiujn diversajn germanajn bierojn ?... Se ne, vi devas bedaŭri vian neĉeeston al tiu evento en Homburgo ! Sabate, la vespero estis dediĉita al biero kun biergustumado. Tiu prahistoria trinkaĵo varmigis rapide la etoson. Male de la vinstumado en Edenkoben, oni ne nur gustumis kaj kraĉis sed glutis la tutan aŭ duonan glasou da amara aŭ pli dolĉa trinkaĵo .

Komence de la kunvena vespero, *Gong-ok Song*, edzino de Harald SCHIKE, lerte aŭskultigis al ni, per grandega tamburo, ritman muzikon de sia lando, Koreujo.



Kursoj unuagrada kaj duagrada dum sabato kaj dimanĉo ne allogis multajn gastojn. Preskaŭ ĉiuj ja, estis spertaj !! Profesoro *D-ro Markus A. Gross* prelegis pri *eŭska lingvo* ( ne baska, kiu rilatas al vestaĵo ).

La ĉefa preleganto estis Harald SCHICKE, germana kuracisto [ [www.esp-ina.com](http://www.esp-ina.com) ], prezidanto de *Esperanta Internacia Naturkurac-Asocio* .Li prezentis tre klare, ĉefe kun

multaj amuzaj anekdotoj, kiamaniere *Naturkuracado* flegas la kaŭzojn de malsanoj, male de tradicia medicino, kiu flegas nur simptomojn .

Mi bone aŭdis " *Manĝu ajlon, trinku bieron !!!... sen alkoholo, se vi ne volas ebriiĝi !* " .

Kompreneble, ni eksciis preskaŭ ĉion pri plantoj, kiujn ni flaris, tuŝis, pesis... kaj ni admiris la strangan radikon de ginsengo en ĝia granda vitra ujo .

Dimanĉon matene, Hartmut Fillmann raportis pri *Esperanta Himalaja Renkontiĝo en NEPALO* sed ĉefe pri sia travivaĵo, pied-ekskurso en la Himalaja montaro. Multaj japanaj geamikoj partoprenis. Li, lia edzino Ursula kaj Franciska estis la kvar "blankuloj" de tiu sporta evento, kiun li revivigis al ni pere de belegaj fotoj .

Denove, vigle kaj simpatie, Madeleine varbis pri la novaj, interesaj, ktp... libroj venditaj. Ĉiam ŝi sukcesis aĉetigi ion al ni ! Ŝi ne forgesis reklamadon por " *OSIEK* " en Slovenio, julie ( 12-18 :), allogaj programo kaj restado.

Mi apenaŭ forgesis, ĉar mi estas ateistino, pastron *Albrecht Kronenberg*. Kiel kutime, li celebris por religiemuloj di-servon en la kapelo de nia gastigejo.

Antaŭ la adiaŭa dispartigo, je la aperitivo kunveno, Prezidento *Oliver Walz* paroladis pri la evento, petante nian revenon venontan jaron je la sama dato ( fine de novembro 2008, male de antaŭaj jaroj, kiam la renkontiĝo okazis dum decembro ).

Ni bondeziris *bonan UNUAN naskiĝdatrevenon* al la plej juna partoprenantino, *Rea Aleteia*, filino de *Susanne* kaj *Sascha Maas*. Niaj bildkart-subskriboj estos memoraĵo por ŝi...

Jocelyne MONNERET



# IF

## La 24-a INTERNACIA FESTIVALO en Düsseldorf en Germanio 27.12. 2007 - 3.1. 2008 Kadra temo: Vojaĝoj



Liba Gabalda

IF, jen agrabla maniero fini la jaron kaj transiri al nova jaro, forgesante la hejmajn zorgojn kaj ĝuante tre amikan etoson en internacia rondo.

Fine de 2007 ĝi okazis en Düsseldorf kaj allogis pli ol 170 partoprenantojn.

Prelegoj, ekskursoj, distraj vesperoj, silvestra balo, novjara promeno, jen la ĉefaj programeroj de IF.

Liba Gabalda, ne nur fotas kaj filmas dum tiu semajno, sed ankaŭ akurate raportas pri ĝi. Jen kion ŝi spertis.

A. Grossmann



Mikaelo Bronštejn  
kaj Ebel Waldemar

Ni nomis ĝin "Koridora IF" (la nova klerigejo ankoraŭ ne estis komplete preta), ĉar multe da tempo ni pasigis en koridoroj. En koridoro ni vicis por manĝoj, en koridoro okazis danc-kurso, polonezo, lumbilda projekciado kaj tie ankaŭ funkciis la libroservo. Al la ĉi-jara IF aliĝis 172 partoprenantoj el 20 landoj. Ni estis pli kunpremitaj ol kutime, sed tio ne malhelpis esti feliĉaj. Malgraŭ ne tro bonaj kondiĉoj kaj limigita spaco la IF estis tre agrabla kaj gaja. Ni havis komfortajn dormoĉambrojn kaj bonajn manĝaĵojn kompanse. Tre bele ornamitaj tabloj dum la silvestra vespero kaj belaspekta bufedo kun variaĵo de manĝaĵoj tre plaĉis kaj bongustis. Pro manko da salonoj ĉiuj ĉefaj prelegoj okazadis en la manĝejo. La programelekto estis vasta kaj alloga por kontentigi ĉies gustojn.



Vizito al malnova urbo Düsseldorf

La kadra temo: VOJAĜOJ transportis nin al diversaj lokoj de la mondo. Pere de bildoj kaj filmo ni povis sekvi transiberian vojaĝon al la Universala Kongreso en Japanio kaj spekti ne nur la kongresan etoson, sed ankaŭ aliajn belajn lokojn en la lando de la leviganta suno. Dum la vojaĝo tra Skandinavio ni admiris pejzaĝojn de Norvegio, Finnlando kaj Svedio kun kelkaj aventuroj. Ne malpli interesa estis pieda promeno kun du azenoj tra pitoreskaj partoj de Francio. Admirinde bela kaj je impresoj plena estis vojaĝo inter Tibeto kaj Kaŝmiro en la plej norda parto de Hindio. Alia prezento montris la vivon de tibetanoj en la ĉefurbo Lasso kaj ankaŭ imponajn palacojn, templojn, monaĥejojn kaj belan naturon. Dum projekciado de bildoj el Kenjo kaj Tanzanio ni spektis sovaĝajn bestojn en naturparkoj de tiuj du landoj. En fora Altajo ni konatiĝis kun bela naturo kaj montara regiono de Siberio. Krom pri la ĉeftemo okazis aliaj prelegoj: Pri abeloj kaj iliaj produktoj, pri sanigaj fortoj de spicherboj, oni parolis pri informado, komunikado, pri klasika Esperanto, pri Zamenhof kaj Postnikov, pri sperto vojaĝi en Esperantujo, pri sukcesa kunlaboro kun la gazetaro, pri Esperanto-partio kaj pri multaj aliaj interesaj temoj.



Ĉiam talentas JoMo por plezuri la publikon



Ĉu tiamaniere HDP solvas la financajn problemojn?



**Tuttaga ekskurso al Lorelej**



**Kajto**

Dum la tria AIS-sesio okazis Internacia Vintra Universitato (IVU). Ĝi enhavis prelegojn pri ĉina astronomio, ĉu vivo sur Marso?, instruoj el la historio de la psikiatrio kaj la dialogaj trajtoj de komunikado kaj de Esperanto.

Dum la vesperaj programeroj ĝojigis nin JOMO, duopo el KAJTO-grupo, muzikis Mihaelo Bronštejn kaj SOLO enkondukis flamenkon. Dum la jubilea 10-a dancvespero ni dancis laŭ orienta maniero kaj dum la balo laŭ ĉiuj manieroj. Grandan sukceson kaj gajan etoson alportis la bier-seminario kun Harald Schicke, dum kiu ni gustumis 9 specojn da bieroj. En la lasta, Internacia Vespero, ni aŭdis poemon, kantojn, flut- kaj akordion-muzikon, spektis dancojn. La duan fojon prezentis sin

barbuloj. Kiel 'honora barbulo' estis akceptita la organizanto de la festivalo, nia kara HDP, al kiu oni fiksis falsan barbon. Li ĝoje akceptis.



**Harald Schicke prelegas pri bieroj**



**Silvestra danc-vespero**

La tuttaga ekskurso okazis dum pluva vetero kaj ni, kiel planite, vizitis Rejnvalon. En tre bela restoracio ni bone tagmanĝis kaj ĉiu ricevis rememore glason, kun gravuraĵo, el kiu ni trinkis freŝvinon. Ĉe vesperigo ni atingis "Lorelej"-on, la faman rokon. La novjara promeno okazis dum plensuna posttagmezo kaj la bona vetero daŭris ĝis la fino de IF.

Do, malgraŭ ne tre adekvataj kondiĉoj pro ne finfaritaj laboroj, ni povas diri, ke la ĉi-jara IF estis tre sukcesa. La 25-a, jubilea Internacia Festivalo okazos samloke, ekde la 27-a de decembro 2008 ĝis la 3-a de januaro 2009. Tiam ni festos en la nova konstruaĵo, kie estos ĉiuj modernaj teknikaj rimedoj, instalaĵoj kaj granda lukso.







Dum la novjara promeno




Mikaelo kaj Svetlana

Informacia vespero



Kantas partoprenantoj el Sankt-Peterburgo



Jen du simpatiaj barbuloj ĉe la neandertala muzeo

Venu sperti, vi certe ne bedaŭros. IF estas aranĝo kun bona okazo por babili, amikiĝi, partopreni riĉ-enhavan programon kaj ĝui neforgeseblan semajnon.

Liba Gabalda

Ĉi-jare estis proponitaj eĉ du plilongigaj tagoj, dum kiuj estis programitaj kelkaj ekskursoj. Partoprenantoj al tiu kvazaŭa IF-eto estis ankoraŭ relative nombraj.

Aparte interesa estis la vizito al la neandertala muzeo, kie ni konatiĝis kun aminda neandertalano, kiu ŝajne ne estas nia praulo. Vespermanĝe ni ĝuis rakledo-vesperon.

En la lasta tago ni vizitis la najbaran urbon Krefeld kaj ties mez-epokan kastelon.

La vespero finiĝis en tipa knajpo de malnova Düsseldorf.

Grazina kaj Maja, niaj simpatiaj knajpistinoj



Fotoj A. Grossmann

profitu la 16-an Internacian Esperanto-Semajnon  
de la Kulturo kaj Turismo

“sub aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo”

de la 4a ĝis la 11a de oktobro 2008

... tiam forestos la kutimaj ~somer-gastoj~ kaj vi ĝuos kvietan kaj plej amikan etoson ...

Hotelo Mediterraneo, str. Vendrell 23, SALOU (Tarragona) Hispanio

**SKIZE PRI LA PROGRAMEROJ**

Karaj gesamideanoj: Ĉi tie ni prezentas al vi la programon de la venonta Semajno 2008.

Ĝi komenciĝos je 11-a horo de la 4-a de oktobro ĝis la 11-a horo de la 11-a tago sammonate. La programo pli aŭ malpli konsistos kiel en pasintaj Semajnoj.

La dimanĉon 5-an estos inaŭguro kun ĉeesto de la lokaj aŭtoritatoj.

Kiel kutime, minimume, estos kvar prelegoj pri diversaj aspektoj ĉu de la Esperanto-movado, ĉu pri aliaj temoj de nia ĉiutaga vivo. Se iu samideano deziras eksponi, konigi siajn kapablojn kiel preleganto, jen oportuno por li. Se jes, volu nin averti kiel eble plej frue.

Ni okazigas du interkonajn vesperojn, kie krom reciproka interkonatiĝo kaj praktikado de nia kara lingvo. Vi povas gustumi frandaĵojn ĉiam “irigaciataj” per bona ĉampano kaj aliaj refreŝigaj trinkaĵoj.

Ni ne forgesas Esperanto-n kaj ĉiam ni organizas kursojn kiujn ĉeestas ne nur gekomencantoj, sed ankaŭ gesamideanoj kiuj jam posedas la lingvon (Ĉiam oni lernas ion)

Ni organizas debatojn, kiuj dependas de la disponebla tempo.

Por 2008 ni jam povas sciigi al vi, ke la ĉefa diskutado estos

**KIO OKAZAS KUN LA INTERNA IDEO ?**

Kompreneble, ni ne forgesas la ekskursojn. Ni organizas tri ekskursojn eksterurbe. Unu tuttaga, du duontagaj. Alia ekskurso estas por koni la vidindaĵojn lokajn.

Jam de kelkaj jaroj, ni omaĝas nia bedaŭrata pionirino s-anino Ada Sikorska Fighiera.

Estas aliaj programeroj. Post la vespermanĝo, okazas diversaj kunvenoj. Oni povas spekti operon pere de video-bendo.

La labortago komenĉiĝas post la matenmanĝo kaj ĝi daŭras ĝis meznokte. La dimanĉan nokton ni dediĉas por ni distriĝi en la lokaj amuzejoj, kiuj estas multaj kaj tre allogaj.

Kompreneble, inter programero kaj programero, vi havos liberan tempon por viziti la strandon, ĉar tiu sezono en Salou, la vetero estas karesema sen malvarmo, nek varmo. De la hotelo Mediterraneo al la strando vi nur bezonos, piede, dek minutojn.

Laste ni menciui la folkloran feston, kie renoma ensemblo distrigas nin per bela kaj frapa muziko. Kaj ni menciui ankaŭ la faman “cremat” kio konsistas el rumo bruligita, miksitita kun bongustaj speciaĵoj.

**ALIĜKOTIZOJ**

Ĝis la 3-a de julio	20 €
Post la 3-a de julio	25 €
Gejunuloj ĝis 25 jaroj senpage	

Kompleta pensio: 32 € en dulita ĉambro po persono kaj tago.

Kompleta pensio: 42 € en unulita ĉambro (unu persono) po tago.

**ATENTU: La kvanto de ĉambroj unulitaj estas limigita!**

**Ĉu vi estas preta dividi ĉambron kun alia persono?**

Petu aliĝilon ĉe :

**Luis Serrano Perez, Apartat 423, ES-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanio**





# On "congresse" aussi de l'autre côté de l'Océan ! ===== ☆

Bravo à nos amis et samideanoj québécois, dont le *Congrès Panaméricain d'Eo* de juillet 2008 jouit d'une mention parmi les événements 2008 de A à Z du site *Planète Québec*

Gratulon al niaj kebekaj amikoj kaj samideanoj, kies *TutAmerika Kongreso de Eo (TAKE)* en julio 2008 menciatas inter la eventoj de la jaro 2008 en la retejo *Planedo Kebekio!* :)

## Planète Québec

"... *Nekomprenebla* – Vous trouvez l'aventure de l'espéranto *~abracadabrante~*? En juillet, vous pourrez en savoir plus sur cette étonnante langue inventée, car Montréal reçoit le 7e congrès d'espéranto des Amériques, ou TAKE pour "...Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto", unissant des espérantophones enthousiastes. ( *Nekomprenebla?* "*abracadabrant*" en espéranto! )..."

ça donne encore plus envie d'y aller, non?... en guise de pré-congrès du *Congrès International 2008* à Rotterdam :)  
Tio ankoraŭ pli instigas veturi tien, ĉu ne?... kiom partopreninda antaŭ-kongreso al UK 2008 en Roterdamo !

Pli da informoj ĉe : <http://www.take7.ca/enkonduko-eo.html>

Aleks

"odo" al mia ĉefo ...



Mia ĉefo dum la tuta tago daŭre laboras en sia oficejo kun diligenteco kaj inteligenteco, kaj neniam perdas sian tempon pro babilaĵoj kun siaj kolegoj. Neniam li rifuzas uzi sian tempon por helpi la aliajn, kaj spite al tio li finpoluras siajn projektojn akurate. Tre ofte li uzas kromajn horojn por plenumi la petitajn taskojn, foje eĉ ne priatentante sian brakhorloĝon por la kafopaŭzo. Jen persono, kiu havas absolute nenan vantecon spite al siaj mirigaj realigaĵoj. Ni ankaŭ aludu lian grandan kompetentecon en komputiko. Jen homo pri kiu oni parolas kun granda estimo kaj respekto, tipo de persono, pri kiu oni ne povas rezigni. Mi firme kredas, ke li altgrade "meritas"... \*\*\* cetere malebligante al kunlaborantoj ne tro laboremaj maldungon. Nia entrepreno iĝos ankoraŭ pli profitdona.

\*\*\* la verbo *meriti* ankaŭ uzatas *netransitive* (Z)

*Eble vi tro rapide okulumis... Legu nur la neparaĵn liniojn, komencante je la unua !*

## Ni aŭskultu... kaj ĝuu ! ...



Hodiaŭ, la 20an de februaro 2008 aperis la dua podkasto de "*La Ondo de Esperanto*".

Post superrigardo pri la reagoj al la unua radioprogramo de "*La Ondo*", oni povas aŭskulti Esperanto-novaĵojn el pluraj landoj de la mondo, prezenton de la nova disko "*Invito por vojaĝo*" de Jacques Yvart kaj, kiel la ĉefan programeron, humuran novelon "*Historio de komerca entrepreno*" de Anton Ĉeĥov. La 38-minutan programon voĉe prezentas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.




- La podkasto de "*La Ondo*" estas aŭskulteblaj ĉe <http://la-ondo.rpod.ru/>

[premu la son-vinjeton por aŭskulti]

- Oni povas aboni la podkastojn. Se vi havas "iTunes" aŭ similan programon, enmetu en la abonejo la adreson:

<http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>

*Bonan aŭskultadon!*



## 7<sup>o</sup> TAKE en Montrealo

**De la 11a ĝis la 18a de julio 2008**, MONTREALO ricevos la 7an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto, kiun ĉeestos esperantistoj el la Amerikoj, kaj eĉ el ekster la kontinento. **Venu kongresi en montreala etoso!**

TAKE 7: bunta programo !

TAKE estas kongreso, kiu okazas ĉiun trian jaron, ekstarigita de la Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio. La ĉi-kongresa temo estas : « *Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj : diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj* ». Estos planitaj prelegoj pri tiu temo. Krom tio estos, interalie, spektakloj, ekskursoj tra la urbo, kaj bankedo. Samtempe kun TAKE, okazos la jara renkontiĝo de Esperanto-USA. Ni esperas bonvenigi inter 100 kaj 200 partoprenantoj.

Viziti Montrealon: por ĉies gusto !

La kongresa urbo buntas je aktivecoj. Kvartaloj, kiel la malnova kvartalo, la ĉina kvartalo, la geja vilaĝo kaj la latina kvartalo, plaĉos per sia agrableco. La Reĝa monto kaj ĝia granda parko superas la urbon. Festivaloj, kiel la Ĵaz-festivalo, la humur-festivalo « *Juste pour rire* », kaj la piroteknik-festivalo, distras la urbanojn. Bonaj restoracioj multas, kaj buntas, pro la variaj devenoj de novaj montrealanoj. Montrealo vizitindas!

Montrealaj esperantistoj invitas samideanojn partopreni la 7an TAKE ĉe ili. Ni esperas, ke la interŝanĝoj inter popoloj de la Amerikoj donos novajn ideojn, esperojn kaj amikecojn por plibonigi nian mondon

( vidu franclingvan inviton aliloke )

### ... hypernity ?...

El la blogo de *Paul Peeraerts* ( Ostendo, BE ), ĉe *Iperernity* ... **De 1 al 275 en kvin monatoj ! ...**

Kiam mi aliĝis al *Iperernity* meze de junio 2007, mi tre verŝajne estis la sola Esperanto-parolanto. Mi almenaŭ ne sukcesis trovi iun ajn alian. Mi tiam skribis mian blogon en la germana, ĉar preskaŭ estis nur german- kaj franc-parolantoj tie ĉi. En la momento, kiam fare de *Iperernity* estis decidite aldoni Esperanton al la interfaci ( en tiu tempo ĝi estis nur franca kaj angla ) aldoniĝis malgranda deko da Esperanto-parolantoj, ĉefe tiuj, kiujn mi petis kunlabori al la tradukado de la interfaci, do Bertilo, Cindio, Ivan, Kalle, LaPingvino, Lars, Lodchjo kaj Yves.

Nun, 5 monatojn poste, estas almenaŭ 275, inter kiuj pli ol 20 PRO-membroj. Do ne malbona kresko! Se vi deziras scii, kiel mi taksis tiujn nombrojn, vidu mian alian blogaĵon

[www.iperernity.com/blog/paul\\_peeraerts/25428](http://www.iperernity.com/blog/paul_peeraerts/25428)

**Rimarko HM** : povas esti ke la ĉi posta grafikaĵo ne aperos por ĉiuj, precipe en la Yahoo-listoj. Tiukaze, eblas vidi ĝin kun tiu teksto ĉe :

[http://www.iperernity.com/blog/paul\\_peeraerts/24925](http://www.iperernity.com/blog/paul_peeraerts/24925)

La kresko ankaŭ estas nerekte konstatebla el la vizitnombro al mia spaco. En la tagoj antaŭ la aldono de Esperanto mi havis mezume 35 vizitantojn. Tuj post la esperantigo de la fasado la vizitnombro kreskis al meze 60 kaj ekde la 18a de oktobro ĝi ĉiutage superis 100.

**Komplementaj informoj HM** : prefere uzu, por la statistikoj, rektan aliron al la Esperanta interfaci ĉe [www.iperernity.com/?lg=eo](http://www.iperernity.com/?lg=eo)

Ne forgesu ke, por preparo de dokumentoj aperigotaj ĉe *Iperernity*, ekzistas la senpaga kaj libera programo "*Miro*", ankaŭ kun esperanta interfaci, uzebla same por Windows kiel por Mac aŭ GNU/Linuxo; ĝi ebligas spekti videodokumentojn en plej diversaj formatoj.

Sciu ke ekzistas ankaŭ tre interesa kaj utila ebleco (uzebla en 19 lingvoj, sed bedaŭrinde ĝis nun ne en Esperanto) por senpage konverti plej diversajn dokumentojn (arkivojn, videojn, bildojn, sondokumentojn, muzikon), ĝis 150Mb sen instalo de programo :

<http://media-convert.com/convertir/>



... notre argumentaire bilingue

nia dulingva argumentaro ...

**Leonard ORBAN**, Membro de la *Eŭropa Komisiono* taskita pri multlingvismo, invitis sur siaj retpaĝoj, al pritrakto de la temo "*Multilinguisme - La parole est à vous*" "*Et vous, que pensez-vous des langues en Europe?*" "*Vous heurtez-vous, dans votre vie quotidienne, à des difficultés d'origine linguistique?*" - 6 Février, 2008

En sia enkonduka artikolo, li iom skribis pri Esperanto, eble ne malbonintence, kaj multaj esperantistoj reagis :

« *Le multilinguisme de l'Union Européenne est clairement délimité par le droit communautaire. Pour devenir langue officielle de l'Union, il faut qu'une langue jouisse du statut de langue officielle – reconnu par la Constitution – dans l'un des États membres, que celui-ci demande pour elle le statut, précisément, de langue officielle de l'Union et que les autres États membres acceptent cette requête à l'unanimité.*

*C'est l'une des raisons pour lesquelles l'espéranto ne peut devenir la lingua franca de l'Union. Autre raison : la spécificité de l'espéranto, dont le vocabulaire social ou culturel n'est guère étendu. Les conséquences pratiques et financières qu'entraînerait la création ex novo de terminologies spécialisées dans une langue artificielle sont immenses. Que l'on songe aux codes douaniers, par exemple, ou à la législation bancaire, ou encore, aux spécifications techniques de récipients à pression de forme géométrique simple... parfois appelés « cylindres de frein ». J'ajouterai à cela une troisième raison, plus personnelle : je n'attends rien d'une lingua franca, qu'il s'agisse de l'espéranto, du latin ou... de l'anglais. L'histoire montre qu'une lingua franca est un phénomène socio-linguistique spontané, non le fruit d'une décision législative ou politique. Sans doute quelques espérantistes présents sur ce forum ne sont-ils pas d'accord avec moi, mais je crois en la confrontation des points de vue, certains arguments m'ont paru très intéressants, même s'ils ne m'ont pas convaincu » .*

Sinjoro Orban,

Ĉu vi aŭdacus esprimi aŭtoritan opinion pri temo, kiun vi neniam estus studinta, pri libro kiun vi ne estus leginta, pri lando en kiu vi ne estus longtempe restadinta ? Estas tiom da eraroj en la kelkaj frazoj, kiujn vi skribis pri Esperanto, ke libro ne sufiĉus por reĝustigi ilin.

La fakto, ke via ĉirkaŭularo montriĝas tiel nekapabla demeti okulŝirmilojn devus instigi vin demandi ĉirkaŭ vi sur kio baziĝas ĝia opinio, kaj vi tre rapide konstatus, ke temas pri nenio alia ol antaŭjuĝoj kaj onidiroj. Je la origino de la ĉeno de misinformado, preskaŭ same malnova kiel Esperanto, estas antaŭjuĝoj kaj malamikeco esprimitaj fare de povoj nur ŝajne demokrataj ( *la povo de mono mortigas la demokration* ), aŭ eĉ totalismaj. Multaj reagis al la ideo de Esperanto kvazaŭ ni estus ankoraŭ en 1887, t.e. la jaro de publikigo de la *Unua Libro* en Varsovio. De tiam la vortrezoro konsiderinde pliriĉiĝis.

Vi provis pritrakti la demandon pri terminologio. Estus tede priskribi la laborojn faratajn tiudirekte.

Ekzemplodone, vd

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Fakverko:Scienco>

Aspektas utile atentigi ankaŭ pri konferenco pri la aplikoj de Esperanto en la sciencoj kaj teknikoj okazonta en proksimeco de Prago (*Dobřichovice*) de la 7a ĝis la 9a de Novembro 2008 : <http://www.kava-pech.cz/trip-kaest2008e-esperanto.html>

Kiam vi skribas, ekz. pri terminoj kiel "*cylindres de frein*", vi sciu ke ĝi ekzistas en la "*Lexique ferroviaire français-espéranto*" de André Blondeaux eldonita en 1978 de "*Esperanto-Fervoĵisto*" kaj presita en Pont-l'Abbé ĉe *Helio-Plans*.

por la vorto "cylindre" oni trovas vidalvide *cilindro*

por "à basse pression" : *basprema*

por "à haute pression" : *altprema*

por "de frein" : *de bremsa*

Monsieur Orban,

Oseriez-vous exprimer un avis autorisé sur un sujet que vous n'auriez jamais étudié, sur un livre que vous n'auriez jamais lu, sur un pays où vous n'auriez jamais séjourné longtemps ? Il y a tant d'erreurs dans les quelques phrases que avez écrites à propos de l'espéranto qu'un livre ne suffirait pas pour les rectifier.

Le fait que votre entourage se montre aussi incapable d'enlever ses œillères devrait vous inciter à lui demander sur quoi se base son avis, et vous constateriez très vite qu'il ne s'agit-là de rien d'autre que de préjugés et de ouï-dire. À l'origine de la chaîne de désinformation, presque aussi ancienne que l'espéranto, il y a des préjugés et une hostilité injustifiable exprimés par des pouvoirs démocratiques dans les apparences seulement ( le pouvoir de l'argent tue la démocratie ), voire totalitaires. Bon nombre de gens réagissent à l'idée de l'espéranto comme si nous étions encore en 1887, c'est-à-dire l'année de publication, à Varsovie, du *Premier Manuel*. Depuis lors, le vocabulaire s'est considérablement enrichi.

Vous avez tenté d'aborder la question de terminologie. Il serait fastidieux de décrire les travaux accomplis en ce sens. À titre d'exemple, voir :

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Fakverko:Scienco>

Il paraît cependant utile de signaler aussi qu'une conférence traitant des applications de l'espéranto dans les sciences et les techniques se tiendra près de Prague (*Dobřichovice*) du 7 au 9 novembre 2008 :

<http://www.kava-pech.cz/trip-kaest2008e-esperanto.html>

Lorsque vous écrivez, par exemple, à propos d'un terme technique comme "*cylindres de frein*", sachez qu'il existe dans le "*Lexique ferroviaire français-espéranto*" d'André Blondeaux, édité en 1978 par "*Esperanto-Fervoĵisto*" et imprimé à Pont-l'Abbé chez *Helio-Plans* :

pour le mot "cylindre" on trouve, en face : *cilindro*

pour "à basse pression" : *basprema*

... do, "cilindro de brems". Oni povus ankaŭ skribi aŭ diri "bremso-cilindro" kun aŭ sen lig-streketo. Kie kuŝas la problemo ? Ĉu ne en viaj neaktualigitaj dokumentaro kaj informfonto ?

En la Esperanto-eldono de la germana ilustrita vortaro "Das Bildwörterbuch der deutschen Sprache", tradukita fare de Rüdiger Eichholz kun helpo de 143 kunlaborantoj el 25 landoj kaj eldonita en 1988 sub la titolo "Esperanta Bildvortaro" fare de Esperanto Press, Bailieboro, Kanado, aperas, en paĝo 196 rilata al aŭtomobilo, la nombro 52 kondukanta al "brems-cilindro de la rado".

Tio sen paroli pri "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (bPIVb) kiu, en sia eldono 2005 ( ĉe SAT en Parizo ) enhavas 16 780 kapvortojn kaj en kiu oni tutenature trovas la vortojn "bremso" kaj "cilindro", tio kun la vastaj kombineblecoj en kiu Esperanto tre superas plimulton el la lingvoj.

En 1974, la eldonejo Kluwer ( Nederlando ) publikigis komercan-ekonomikan vortaron en 9 lingvoj, kun titolo "Naŭlingva komerca-ekonomika vortaro" ( *International Business Dictionary in nine languages* ) de F. Munniksma, kompilita per Esperanto kaj ne la angla, kiu estas en ĝi la dua lingvo. La tria eldono, en dekunu lingvoj, aperis en Ĉinio en 1990 kun, plie, la japana kaj la ĉina sub la titolo "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 11 lingvoj".

Tiuj, por kiuj la vorto "cilindro" povas aspekti stranga kompare al la angla kaj la franca, ili bonvolu konsulti la multlingvan vortaron <http://www.majstro.com/ĉehttp://www.majstro.com/Web/Majstro/spVert.php?teVertal=en=cilindro&gebrTaal=epo&bronTaal=epo&doelTaal=afri> kaj ili konstatos, ke ĝi aperas tiel same en la itala, la hispana kaj la portugala. Tio por montri al vi, ke uzantoj de Esperanto serioze laboras por pluti la Internacian Lingvon je la nivelo de la plej "grandaj" lingvoj, kaj tio bonvoleme, do, sen financa kontribuado de la ŝtatoj.

La sinteno de tiuj, kiuj gvidas Eŭropan Union similas al tiu de la privilegiitoj, kiuj dum du jarcentoj baris la vojon al la hindaj-arabaj ciferoj. Tio estas giganta, nemezurebla kaj skandala malŝparego, kiam mankas tiom da homaj, financaj kaj materialaj rimedoj por solvado de tiom da gravaj problemoj.

Dankon pro via atento.

Henri Masson  
espero.hm(ĉe)wanadoo.fr  
[www.esperanto-sat.info](http://www.esperanto-sat.info)

pour "à haute pression" : *altprema*  
pour "de frein" : *de brems*  
... donc, "cilindro de brems". On peut aussi écrire ou dire "bremso-cilindro" avec ou sans trait d'union. Où se trouve le problème ? Ne serait-ce pas dans votre documentation et votre source d'information non actualisées ?

Dans l'édition en espéranto du dictionnaire illustré allemand "Das Bildwörterbuch der deutschen Sprache", traduit par Rüdiger Eichholz avec le concours de 143 collaborateurs de 25 pays et édité en 1988 sous le titre "Esperanta Bildvortaro" par Esperanto Press, Bailieboro, Canada, on trouve, en page 196, concernant l'automobile, le chiffre 52 conduisant à "brems-cilindro de la rado" ( *cylindre de frein de la roue* ).

Ceci sans parler du "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" ( PIV ) qui, dans son édition 2005 ( chez SAT à Paris ) comporte 16 780 entrées et dans lequel on trouve tout naturellement les mots "bremso" et "cilindro", ceci avec les ressources combinatoires étendues dans lequel l'espéranto se montre très supérieur à la plupart des langues.

En 1974, les éditions Kluwer ( Pays-Bas ) ont publié un dictionnaire commercial et économique en 9 langues, le "Naŭlingva komerca-ekonomika vortaro" ( *International Business Dictionary in nine languages* ) de F. Munniksma, compilé à partir de l'espéranto, et non de l'anglais qui en est la seconde langue. La troisième édition, en onze langues, est parue en Chine en 1990 avec le japonais et le chinois en plus sous le titre "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 11 lingvoj".

Quant à ceux pour qui le mot "cilindro" pourrait paraître étrange par rapport à l'anglais et au français, qu'ils consultent le dictionnaire multilingue <http://www.majstro.com/surhttp://www.majstro.com/Web/Majstro/spVert.php?teVertal=en=cilindro&gebrTaal=epo&bronTaal=epo&doelTaal=afri> et ils constateront qu'il apparaît tel quel en italien, espagnol et portugais. Ceci pour vous montrer que des usagers de l'espéranto travaillent sérieusement pour maintenir la Langue Internationale au niveau des "grandes" langues, et ceci bénévolement, donc sans contribution financière des États.

Le comportement de ceux qui conduisent l'UE par rapport à l'espéranto s'apparente à celui des privilégiés qui firent barrage pendant deux siècles aux chiffres indo-arabes. C'est un gâchis inqualifiable, incommensurable et scandaleux quand il manque tant de moyens humains, financiers et matériels pour la solution de tant de problèmes graves.

Merci pour votre attention.

apprendre  
l'espéranto...

rapidité...  
efficacité...

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

"... ? ..."  
- ".... ! !"




...chez soi !

deux maîtres-mots  
de notre cours  
par correspondance !...

Edmond LUDWIG  
26 route de la Schlucht  
68140 STOSSWIHR


une diffusion  
sur toute la région  
...et au-delà !



① 03 89 77 52 55

... des pionniers de l'aviation et l'espéranto ...

... pioniroj de aviado kaj esperanto ...



Henri FARMAN

A Issy-les-Moulineaux, commune située à la limite Sud-Ouest de Paris, une exposition se tient, jusqu'au 25 mai 2008, sur le thème

**"13 janvier : un exploit dans le ciel d'Issy"**

[http://www.culture.fr/sections/regions/ile\\_de\\_france/articles/exposition-13-janvier](http://www.culture.fr/sections/regions/ile_de_france/articles/exposition-13-janvier)

[http://www.issy.com/index.php/fr/la\\_ville/histoire/issy\\_berceau\\_de\\_l\\_aviation](http://www.issy.com/index.php/fr/la_ville/histoire/issy_berceau_de_l_aviation)

C'est là que, le 13 janvier 1908, *Henri Farman*, un des pionniers de l'aviation, réussit un vol d'un kilomètre en circuit fermé en avion.

Bien que l'exposition n'ait rien à voir elle-même avec l'espéranto, il n'est pas inutile de savoir que Henri Farman (1874-1958) ...


FR [http://fr.wikipedia.org/wiki/Henri\\_Farman](http://fr.wikipedia.org/wiki/Henri_Farman) **apporta son soutien à l'espéranto.** Il fit connaissance de la Langue Internationale par le mécène *Ernest Archdeacon*, avocat d'origine irlandaise, président de l'Aéro-Club de France, passionné de découvertes et de techniques : aviation, automobile, photographie, etc., **et... espéranto.** Une préface de huit pages signée par *Henri Farman* apparaît dans le livre qu'*Archdeacon* publia en 1910 sous le titre "**Pourquoi je suis devenu espérantiste ?**" (Fayard, Paris, 1910. 266 p.). En p. 10-11, on lit :

*"C'est lors d'un voyage à Vichy, où nous allions explorer un aérodrome de cette ville, qu'Ernest Archdeacon fit de moi un disciple de l'espéranto.*

*Pendant la route, en chemin de fer, il commença à me "chapitrer"; et presque de suite, je fus émerveillé et conquis.*

*En un quart d'heure, au plus, il m'en montra tout le mécanisme : il n'est besoin d'être agrégé de grammaire, ni même bachelier ès-lettres, pour le saisir : que chacun consente à sacrifier trois heures à l'étude de la langue, et bientôt tout le monde pourra se faire comprendre : un petit effort est bientôt récompensé au centuple...*

*Pour moi, les occupations effroyablement absorbantes de mon métier de constructeur d'aéroplanes, de pilote, et de "professeur", ne m'ont malheureusement pas encore laissé libres les quelques heures de travail qui seraient nécessaires pour "parler couramment l'Espéranto"; mais je le lis à livre ouvert, et je l'écris assez facilement: j'ai même déjà eu, une fois, l'occasion de l'utiliser dans ma correspondance commerciale".*



Ernest ARCHDEACON

En *Issy-les-Moulineaux* ( *isi le mulino* ), komunumo situanta je la sudokcidenta la limo de Parizo, okazas ĝis la 25a de majo 2008, ekspozicio pri la temo

**"13a de januaro : granda faro en la ĉielo de Issy"**

Tie, la 13an de januaro 1908, *Henri Farman*, unu el la pioniroj de aviado, sukcesis en la unua unukilometra rondira aerflugo per aviadilo.

Kvankam la ekspozicio mem estas sen rilato kun Esperanto, ne malutilas scii kaj sciigi, ke *Henri Farman* (1874-1958)

- EO [http://eo.wikipedia.org/wiki/Henri\\_Farman](http://eo.wikipedia.org/wiki/Henri_Farman) ortografio de la persona nomo tie nekorekta, **subtenis Esperanton.** Li konatiĝis kun la Internacia Lingvo pere de la meceno *Ernest Archdeacon\**, irlanddevena advokato, prezidanto de *Aéro-Club de France*, kiu pasiĝis pri ĉiuj teknikoj : aviado, aŭtomobilo, fotografado, ktp, kaj... Esperanto .

Ok-paĝa antaŭparolo de *Henri Farman* aperas en libro, kiun *Archdeacon* publikigis en 1910 sub la titolo "**Pourquoi je suis devenu espérantiste ?**" ( **Kial mi fariĝis esperantisto ?** — Fayard, Parizo. 266 p. ).

En p. 10-11, oni legas (traduko) :

*"Okaze de vojaĝo al Vichy ( viŝi ), kien ni iris esplori aerodromon de tiu urbo, Ernest Archdeacon faris el mi disciplon de Esperanto. Dumvoje, en trajno, li strebis konvinki min; kaj, preskaŭ tuj, mi estis mirigita kaj konkerita.*

*Dum ne pli ol kvaronhoro, li montris pri ĝi la tutan mekanismon : ne necesas esti agregaciulo pri gramatiko, eĉ ne abituriento pri beletro, por ĝin kompreni : ĉiu konsentu foroferi tri horojn al lernado de la lingvo, kaj baldaŭ ĉiuj povos interkompreniĝi : malgranda strebo estos centoble rekompencita...*

*Por mi, la terure temporabaj okupoj de mia profesio de aeroplan-konstruisto, de piloto, kaj de "instruisto", bedaŭrinde ne lasis al mi liberaj la kelkajn horojn kiuj estus necesaj por "flue paroli Esperanton"; sed mi ĝin legas sen peno, kaj mi ĝin skribas sufiĉe facile: mi eĉ havis, foje, okazon uzi ĝin en mia komerca korespondado "*

En la du lastaj paragrafoj, p. 12, *Farman* konkludis :  
*"Mi ripetas, cetere, ke la kreo de Esperanto respondas, por ĉiuj aviadistoj, al vera bezono : mi ne dubas, ke tiuj ĉi baldaŭ komprenos tion. Iliaj modernaj vehikloj, kaj la prava intereso, kiujn ili estigas, fortege servos ilin por disvastigi tiun grandegan progreson, ( kiu nomiĝas la*

Dans les deux paragraphes de conclusion, p. 12, Farman déclarait :

" Je répète, d'ailleurs, que la création de l'Esperanto répond, pour tous les aviateurs, à un véritable besoin : je ne doute pas que ceux-ci ne le comprennent bientôt. Leurs modernes véhicules, et l'intérêt légitime qu'ils suscitent, les serviront puissamment pour répandre et diffuser cet immense progrès, (qui s'appelle la langue universelle Esperanto), à tous les coins du monde ".  
( Mourmelon-le-Grand, 15 avril 1910 ).

Dans une lettre de janvier 1928, la direction des lignes Farman informa le Secrétaire Général de la Ligue Internationale du personnel espérantiste des PTT qu'elle avait décidé de faire apprendre l'espéranto à son personnel navigant

Mais la pression déjà croissante de l'anglais ne permit pas le choix démocratique et rationnel d'une langue pour l'aviation. Ce rôle lui est dévolu non pas en fonction d'une caractéristique linguistique plus adaptée ou d'une quelconque supériorité, mais à cause de la puissance du pays lequel a progressé plus tôt et plus rapidement dans la construction et l'exploitation des appareils. Des catastrophes aériennes se sont produites du fait que le choix d'une langue plus adéquate que l'anglais pour l'intercommunication des personnels de l'aviation d'idiomes différents n'a jamais fait l'objet de recherche ni même été rendu possible.

universala lingvo Esperanto ) en ĉiuj lokoj de la mondo " ( en Mourmelon-le-Grand, la 15an de aprilo 1910 ).

En letero de Januaro 1928, la direkcio de la aerlinioj Farman informis la Ĝeneralan Sekretarion de la Internacia Ligo de la esperantista personaro de PTT, ke ĝi decidis lernigi Esperanton al sia fluganta personaro.

Sed la jam kreskanta premo de la angla malebligis demokratan kaj racian elekton de lingvo por aviado.

Tiun rolon ĝi ludas, ne pro lingva plitaŭgeco aŭ supereco, sed pro la potenco de la lando, kiu plej frue kaj rapide progresis en la konstruado kaj ekspluatado de aviadiloj. Aerkatastrofoj okazis pro tio, ke elekto de pli taŭga lingvo ol la angla por uzo inter diverslingvanoj en aviado neniam estis pritraktita nek ebligita.

(FR) <http://www.esperanto-sat.info/article193.html>  
(EN) <http://www.esperanto-sat.info/article351.html>

\* Pri Ernest Achdeacon, vd :

(EO) [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ernest\\_Archdeacon](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ernest_Archdeacon)

(FR) [http://fr.wikipedia.org/wiki/Ernest\\_Archdeacon](http://fr.wikipedia.org/wiki/Ernest_Archdeacon)

---

---

Henri MASSON

<http://www.ipernity.com/?Ig=eo>

[espero.hm\(ĉe\)wanadoo.fr](mailto:espero.hm(ĉe)wanadoo.fr)

---

---

Kiel aludite supre, la eksternorma malfacileco « klare » elprononci la anglan idiomon dum la teknika aŭ punkta interkomunikado inter du pilotoj, daŭre malkvietigas certagrade pli ol unu el ili. Tion ni plene konsciu, eĉ se la sekvantaj linioj provos ŝovi iom da humuro en la aferon.

P. Denis



## On dit que la langue française EST compliquée, mais que dire de l'anglais !

Oni diras ke la franca lingvo ESTAS komplika, sed kion diri pri la angla !

Kaj nun, por rekompenci vin, jen leciono de la angla :-)

Et maintenant, pour vous récompenser, voici une leçon d'anglais

Dankon al Patrice Joly pro la sendo – mi aldonis E-transskribon.

Merci à Patrice Joly pour l'envoi – j'ai ajouté la transcription espéranto.

- France / français : ...de 1H58 à 2H02 ... de une heure cinquante-huit à deux heures deux...

★ Laŭvorta transskribo en Esperanto / transcription au mot à mot en espéranto : de unu horo kvindek-ok ĝis du horoj du.

- Angle / anglais : ... from two to two to two two ...

- France / français : Trois sorcières regardent trois montres Swatch. Quelle sorcière regarde quelle montre Swatch ?

★ Transskribo Ee / transcription en espéranto : Tri sorĉistinoj rigardas tri horloĝojn Swatch. Kiu sorĉistino rigardas kiun horloĝon Swatch ? ( ne estas indikite, ĉu temas pri poŝ- au brak-horloĝoj ).

- Angle / anglais : ... Three witches watch three Swatch watches. Which witch watches which Swatch watch?...



Et maintenant pour les spécialistes...

Kaj nun, por la fakuloj...

- France / français : Trois sorcières suédoises et transsexuelles regardent les boutons de trois montres Swatch suisses. Quelle sorcière suédoise transsexuelle regarde quel bouton de quelle montre Swatch suisse ?

★ Transskribo Ee / transcription en espéranto : Tri svedaj kaj trans-seksaj sorĉistinoj rigardas la butonojn de tri svisaj horloĝoj Swatch. Kiu sveda trans-seksa sorĉistino rigardas kiun butonon de kiu svisa horloĝo

Swatch ?

- Angle / anglais : ... Three Swedish switched witches watch three Swiss Swatch watch switches. Which Swedish switched witch watches which Swiss Swatch watch switch?...



## Pri aŭtodidaktismo ...

kaj pri tro ofte malkonita avantaĝo de esperanto



Kiam oni parolas pri instruado de esperanto en bazlernejo, ofte oni obĵetas necesan klerecigon de la specialigitaj instruistoj. Por instrui lingvon ne jam konita de la lernantoj, ŝajnas ja ke la instruanto nepre devu kapabli ĝin altnivele praktiki.

Tio okulfrapas pri instruado de lingvo, kiu evoluigis dum jarcentoj, per akumulado da diversaj influoj kaj eraroj, iom post iom normigaditaj. Tiel ĉiu lingvo, kiun oni diras « natura », sekvas regulojn plenigitajn de esceptoj ( kun esceptoj en esceptoj ), fremdajn strukturojn, aludojn, duoblajn signifojn, dekuntekstajn signifojn. Tiu kompleta « riĉeco » de la gepatra lingvo estas akirita de longa konstanta praktiko, ek de la bebtempo, ĝis la fino de la vivo, kaj oni nepre deziras ĝin konservi kiel estaĵo de si mem. Ne eblas detruiri iun gepatran lingvon sen perdi identecon de humanarero, kies lingvo estas la plej efika rimedo por esprimi siajn plej intimajn sentojn. Pro tio necesas savi ĉiujn lingvojn, kaj ne limigi la multilingvismon al kelkaj lingvoj diritaj pli « grandaj » ol la aliaj.

Tiel klare vidiĝas ke, por perfekte instrui tian lingvon, la instruanto devus ĝin koni tiel bone ol tiuj, kies lingvo estas gepatre. Se ne, li kulpas pri kelkaj eraroj. Kaj, ĉar tiukaze simpla logiko ne ebligas kompensi aĉmemoradon, la eraroj estos komprenitaj kiel veraĵoj. Nur la scio de la instruanto fondas tion kion la lernanto lernas. Sekvas la tre longdaŭraj studoj, la ĉeestadoj en landoj kie tiu lingvo estas parolata ... kaj la kostego le la instruado de la lingvo.


Feliĉe, esperanto ne estas lingvo « sama kiel la aliaj ». Zamenhof kun liaj kostudentoj iom palpe provetis kelkajn skizojn. Sed fine, li kreis sistemon striktan, koheran, kie logiko superas memoron, ĉar la reguloj kunportas nenium escepton. Kaj la gramatikaj funkcioj determinas konstruadon de la vortoj kaj de la frazoj. (Tuj rimarku, ke tio ne malebligas, ke esperanto kapablas, kiel Maurice Genevoix diris, esprimi *la plej subtilajn nuancojn de la penso kaj de la sento* )

Do eblas lerni esperanton sen instruanto . Tion faris la "praaj" esperantistoj, kiuj havis nur klerigantan broŝureton por lerni la sufiĉantajn fondaĵojn. Ili tamen sukcesis skibe korespondi kaj skribante progresi, kaj ili vivis en Bolojno dum 1905 intenan kortuŝon, ekvidante ke ili interkompreniĝis, ke ili samtempe sekvis prelegon ( riroj kaj aplaudoj, sen disigadoj pro la diversaj daŭroj de tradukadoj ), ke ili sentas sin egalaj en debatoj.

Tiel, sen atendi ke ĉiuj lernantoj decidu lerni per si-mem, oni vidas ke instruisto, de kiam li senhezite rekonas la neŝanĝeblan prononcon de ĉiu litero, ke li respektas la neŝanĝeblan lokon de la akcento, kaj ke li konas la 16 regulojn ( sen esceptoj ) de la gramatiko, li kapablas komenci la instruadon : Li instruos nenion malĝustan. Dum li instruos, li lernos novajn radikojn, kaj precipe vigligos sian lertecon por konstrui vortojn kaj frazojn. Unu jaron poste, li kapablos, se li deziras, partopreni en internacia kongreso. Jam kelkaj miloj da instruistoj vivis tiun eksperimenton.

Tial semajna kleriganta staĝo verŝajne sufiĉos al instruisto, por ke li kapablu komenci instrui esperanton, ĉiam konservante antauecon po unu leciono rilate al siaj gelernantoj, kiuj plue eklernis sin korektigi unu la alian, kun la luda sento kune progresi, same kiel la unuaj esperantistoj.

Do, okulfrapas, ke enirado de esperanto, kiel bazinstruado en bazlernejo, ne sekvigus tiajn malfacilecojn kaj elspezojn, kiujn sekvas enirado de fremda lingvo. Kaj rilate al la tempo dediĉita al tiu instruado, po 10 minutoj klasotage , ĝi estos plene rericivita el la tempo, kiu estus dediĉita al ia gramatika instruado de la gepatra lingvo ne apogita sur esperanto. Pripensu al tempo, kiun necesas depreni el la aliaj bazinstruadoj por la ekinstruado de fremda lingvo en bazlernejo!



## Louis-Camille MAILLARD et l'espéranto



En marge d'un communiqué administratif...



### Une rue au nom du savant Louis-Camille MAILLARD va voir le jour sur le Plateau de Haye

Enregistrement en Préfecture de Meurthe & Moselle 54 le 03/10/2006

Ville de Nancy

Extrait des registres des délibérations du conseil municipal de la ville de Nancy

Séance du **25 septembre 2006** n° VIII – 6

Objet : Dénomination de voiries sur le Plateau de Haye

rue Henry BRUN et rue **Louis-Camille MAILLARD**

Rapporteur : *Monsieur le Maire André ROSSINOT*

## Tous... adeptes de l'espéranto !

En cette fin du 19<sup>ème</sup> et ce début de 20<sup>ème</sup> siècle, le médecin et linguiste polonais Lejzer Ludwik ZAMENHOF met au point l'Espéranto. Son grand dessein est de relier les hommes par-delà les frontières et les barrières linguistiques. Les élites scientifiques adhèrent à cet ambitieux projet.

Sises à Nancy en zone frontalière, les communautés médicales de l'Est de la France, fortes de ses nombreux réfugiés, **apportent un appui sans réserve au programme de Zamenhof**. Les réunions nanciennes sont très courues et l'assistance compte dans ses rangs moult médecins de " ***l'Ecole de Nancy***" \*.

*\*L'appellation Ecole de Nancy qualifie les médecins célèbres tels les grands professeurs Lièbault, Bernheim, Vuillemin, Hergott, Spillmann et quelques autres. Freud lui-même vient à Nancy assister aux conférences des Maîtres. Ce n'est que plus tard que les artistes de l'Art Nouveau associeront leurs noms à cette dénomination à l'instigation de Gallé. Alors, rendons à César !..."*

Le **Groupe Médical Espérantiste de France** organise son congrès mondial. Celui-ci se déroule **sous la Présidence de Zamenhof en personne** avec la participation de la Société Française de Physique, de la Société Internationale des Electriciens, des Professeurs Adelsköld, **Appell**, d'**Arsonval**, Baudoin de Courtenay, **Becquerel**, **Berthelot**, Bouchard, **Deslandres**, **Duclaux**, Förster, **Haller**, **H. Poincaré**, **Ramsay**, Général Sebert, etc.

**Monsieur MAILLARD** est Secrétaire des Séances.

*Secrétaire d'une telle assemblée, c'est bien plus qu'un honneur, c'est déjà une consécration !*

**Appell** : (Paul), mathématicien français, né à Strasbourg (1855-1930). On lui doit de nombreux ouvrages sur la mécanique rationnelle.

**Arsonval** : (Arsène d'), physicien français, né à La Borie (Haute-Vienne) {1851-1940}. Il appliqua les courants de haute fréquence à la médecine (*d'arsonvalisation*) et perfectionna le galvanomètre.

**Becquerel** : (Henri) né à Paris 1852, Le Croisic 1908, découvrit la radioactivité en 1896. Prix Nobel en 1903. Fils d'Edmond, Paris, 1820-1891 (spectrographie) et petit-fils d'Antoine, Châtillon-Coligny (1788-1878), auteur de travaux sur les piles, l'électrochimie, la télégraphie.

**Berthelot** : (Marcelin), chimiste et homme politique français, né à Paris (1827-1907). Rival de Pasteur. Auteur de travaux sur la synthèse des corps organiques et sur la thermochimie. Académie Française. Monsieur MAILLARD recevra la Médaille Berthelot en 1919.

**Deslandres** : (Henri), astronome français né à Paris (1853-1948), inventeur du spectrohéliographe.

**Duclaux** : (Emile), biochimiste français, né à Aurillac (1840-1904). Successeur de Pasteur.

**Haller** : Professeur de Maillard à **Nancy**, puis à la Sorbonne et Membre de l'Institut.

**Poincaré** : (Henri), mathématicien français, né à **Nancy** (1854-1912), l'un des plus grands de son temps. Il a découvert les fonctions fuchsienues. Académie Française et Académie des Sciences. " *La théorie de la relativité, c'est lui* ", dit Einstein dans une interview...

**Ramsay** : (sir William), biochimiste britannique, né à Glasgow (1852-1916). Il a découvert l'hélium, l'argon et les autres gaz rares. Prix Nobel 1904.

## Tous ces savants sont de fervents adeptes de l'espéranto.

*L'Espérantiste*. 7, rue Boileau à Paris. AD 54. *Revue médicale de l'Est* BA 166 1904 (15 décembre)

NB – biographie de **Louis Camille Maillard**, « bienfaiteur de l'humanité »

**Louis Camille Maillard** est né à Pont-à-Mousson le 4 février 1878. Après un baccalauréat obtenu à 16 ans et de brillantes études à la **Faculté des Sciences de Nancy** il entre à la **Faculté de Médecine** de la ville et avant même la fin de ses études, il entreprend des recherches de chimie qui retiennent l'attention du monde scientifique, en particulier du professeur Armand Gautier qui lui offre un emploi à la **Faculté de Médecine de Paris** où il est bientôt reçu à l'agrégation de médecine, à 26 ans. A Paris il continue à avoir une activité scientifique très fournie. Il met au point, en particulier, un « *indice d'imperfection urogénique* » qui se révèle être un outil diagnostique très utile et qui ne tarde pas à être très utilisé en médecine sous le nom de « *coefficient de Maillard* ». Il entreprend par ailleurs une thèse de sciences et au cours de ces travaux il découvre une réaction entre les acides aminés et les sucres. Cette réaction, très générale, est connue sous le nom de « *réaction de Maillard* ». Son importance a surtout été reconnue dans l'industrie agroalimentaire car elle est à l'origine du goût de nombreuses préparations culinaires. Ces travaux valent à L.C. Maillard de nombreuses distinctions et en particulier plusieurs prix de l'**Académie des Sciences** et de l'**Académie de médecine**.

En 1914 il s'engage dans l'armée, qui l'avait réformé à cause de sa mauvaise vue. Il est affecté au service de vaccination antityphoïdique où il contracte une grave infection puis se voit confier diverses fonctions jusqu'à la direction du laboratoire de chimie du service de santé des armées. Revenu à la vie civile en 1919, il quitte brusquement Paris pour occuper une chaire à la Faculté de Médecine et de Pharmacie d'Alger et cesse pratiquement toute activité de recherche. Il meurt brutalement à Paris, où il était venu participer au jury de l'agrégation, le 12 mai 1936.

De nos jours on reconnaît à la réaction de Maillard une importance majeure dans de nombreux domaines et en particulier en cuisine et en technologie alimentaire. C'est la raison pour laquelle ses admirateurs n'hésitent pas à le qualifier de « **bienfaiteur de l'humanité** »

*Jean-Louis Rivail*

[ NB- el la redaktejo de *La Informilo* : ni dankas Henri MASSON ( SAT-Amikaro ), kiu ebligis la ellaboron de tiu dosierc ].

## NOVTIPAJ ESPERANTO-EKZAMENOJ PREPARATAJ



Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo, la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligos al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C.

La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksu lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. ( pli da informoj troviĝas en la sekcio Referenc-kadro en [www.edukado.net](http://www.edukado.net) )

La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. En la unua periodo tiaj ekzamenoj estos organizataj de du eŭropaj centroj, kiuj poste trejnus kaj rajtigos ekzamenantojn kaj organizos ekzamensesiojn ankaŭ alioke. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado.

Pri la Referenckadro, taksaj normoj kaj la novtipaj ekzamenoj okazos prezentoj dum la Tago de Lernejo en la UK en Jokohamo. UEA kaj ILEI alvokas siajn landajn asociojn kaj sekciojn akiri kaj studi la broŝuron "*La Komuna Eŭropa Referenckadro*", eldonita de UEA ĉi-jare, kaj laŭ ĝi komenci adapti siajn enlandajn instru- kaj ekzamensistemojn.

Oni povas mendi la broŝuron ĉe la Libroservo de UEA aŭ elŝuti de [edukado.net](http://edukado.net).


Por pliaj informoj kaj klarigoj oni kontaktu la vicprezidanton de ILEI, *Zsófia Kóródy*,  
[esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

# Poetoj por la paco, kontraŭ milito

per viaj pensoj, ideoj, emocioj, por krei pacan mondon

... *Saluton, ho Poeto!*...

La paco eblas



Ĉi norda lando skuas sin vekigē  
post vintra dormo, kaj la kulturistoj  
surpaŝas kampojn vigle kaj feliĉe.  
Jam semoj ĝermas kaj fermentas gistoj.  
Fekundas nia mond' printemposojle:  
kio minacas lupe kaj orgojle ?

Kia sovaĝo, kia pratribismo  
impulsas homojn al perforto krima,  
riski pri homfarita kataklismo,  
paradi por timigo misanima ?  
Kio valoras pli ol kampaniloj,  
trankvilaj gregoj, beboj en luliloj ?

Kiel ni povas gvidi nian sorton ?  
Per amo aŭ malamo. Ni elektas:  
mergiĝi en akordon aŭ en hordon;  
la iron la unua paŝ' direktas.  
Do iru ni en neskuebla fido,  
ke am' pli fortas ol milita strido.

Rifuzu ni malamon interhoman,  
malindajn prainstinktojn ni forĵetu !  
Pacopostulon faru ni, tioman  
ke homoj tra la mondo ĝin ripetu !  
Ni fine pruvu, ke pacemaj fortoj  
pli multenombros ol militkohortoj !

Per la komuna lingvo ni peradu  
komunajn sentojn pri la homfatalo,  
tiel ke nia unuec' persvadu  
gefratojn tra la mondo pri l' realo  
de l' paca vojo al la ĝusta celo:  
militon for, kunvivo en tolero.

S' ébroue, se réveille notre nord  
après un long hiver, et les paysans  
retrouvent leurs champs, allègres et vifs.  
Germent les grains, se lèvent les ferments.  
Le monde entier est prégnant d'un printemps,  
menacé par des loups... de quel orgueil?

Quelle est la force barbare et tribale  
qui pousse l'homme au crime, aux violences,  
au bord d'un cataclysme trop humain,  
aux frasques de soudards du pire aloi?  
Qu' est-ce qui charme plus que nos clochers,  
nos paisibles troupeaux et nos berceaux?

Aux destinées de l'homme qui préside?  
C'est l'amour ou la haine. A nous le choix:  
se fondre dans l'humain ou se damner,  
c'est le premier pas qui trace la voie.  
Cheminons donc, forts d'une foi qui dicte  
que l'amour vainc les clameurs de la guerre.

Refusons la haine entre les hommes,  
rejetons nos instincts les plus funestes!  
Réclamons la paix d'un appel puissant,  
que le monde entier s'en fasse l'écho!  
Démonstrons que les forces de la paix  
l'emportent sur les hordes de la guerre!

Par notre langue passe d'homme à homme  
le sentiment de notre sort commun,  
de sorte que, courageux et unis,  
nous montrerons à nos frères humains  
le droit chemin de paix au juste but:  
plus de guerres, tâchons à vivre ensemble.



*Sinjoro Prezident'*  
*Mi skribus ĉi-letalon*  
*Kaj havas mi esperon*  
*Vi legos kun atent'*

*Alvenis jen paper'*  
*Kun la ordon-invito*  
*Foriri al milito*  
*Merkrede je l' vesper'.*

*Mi diras sen rezon',*  
*Ke tion mi ne faros,*  
*Mi sur la Ter' ne staros*  
*Por murdo de la hom'*

*Ne ofendiĝu vi,*  
*Se mi per ĝi vin spitas,*  
*Mi ĉion mem decidus*  
*Kaj tuj dizertos mi...*

*En mia juna ag'*  
*Formortis mia patro,*  
*Foriris mia frato*  
*Kaj brulis la vilaĝ'...*

*Patrino pro sufer'*  
*Jam kuŝas en la tombo,*  
*Ne zorgas ŝi pri bombo,*  
*Ne zorgas eĉ pri verm'...*

*Dum mia kaptitec'*  
*Jam oni la edzinon*  
*Forŝtelis kaj animon*  
*Kaj la pasinton eĉ'...*

*Jam morgaŭ sen prokrast'*  
*Fermiĝos mia pordo*  
*Al jaroj de la morto*  
*Kaj fuĝos mi kun hast'*



*En almozpeta viv'*  
*Mi iros tra la mondo,*  
*Mi estos vagabondo*  
*Kaj diros re al vi :*

*Rifuzu al buĉad'*  
*Rifuzu mord-inciton,*  
*Ne faru vi militon*  
*Rifuzu al murdad' !...*

*Se fluu nun la sng',*  
*La propran vi donos,*  
*Jen kion mi proponos*  
*Sinjur' de alta rang'...*

*Kaj se vi serĉos min,*  
*Eksciu trup' gendarma,*  
*Ke estos mi senarma,*  
*Ĝi pasu do sen tim'...*


"La paco eblas", de William Auld  
Tradukis István Ertl

La dizertonto – Boris Vian  
tradukis Georges Lagrange

Ek de novembro 1954, kiam komencis  
la "milito" en Algerio, la franca registaro  
malpermesis al ĉiuj radio-sendiloj dis-  
aŭdiĝi tiun kanzonon, taksita "kontraŭ-  
patriotisma".

## Sokrato diris: Mi scias, ke mi scias nenion...


La frazo, kiun proklamis la plej famekonata pensulo, greka filozofo de antiko, Sokrato, estas konata ĝis la hodiaŭaj tempoj. Siatempe li estis la plej saĝa viro de Grekio. Laŭ la historiistoj Sokrato en sia junaĝo ellernis kiel ŝtonhakisto, poste partoprenis en 3 militoj dum polopeneza milito, en pluaj jaroj sin dediĉis al skulptado kaj edziĝis al Ksantipa, kun kiu li havis tri filojn.



Sed la laboro de skulptisto la pensulon ne kontentigadis. Li ekdediĉis sin al filozofio kaj ĝia instruado. El la polopeneza milito estas Sokrato konata kiel entuziasmiĝinta kritikanto de manko de atena demokratio kaj ankaŭ tiu ĉi kritiko en j. 399 a. n. jarcento estis

kaŭzo de lia kondamno al morto. Post fino de la milito en Ateno por mallonga tempo la potencon akiris la aristokratoj. Sokrato kondamnita al morto, akuzita pro nerespektado de ŝtata religio, post la kondamno devis eltrinki pokalon da konio. Eĉ kiam li havis eblecon fuĝi el malliberejo, Sokrato al mortopuno en sia 70 jaraĝo subiĝis. Sokrato mem klarigadis sian filozofion nur parole nenian verkaĵon li eldonis. Centro de lia filozofio estis la etiko, en sia instruado li okupiĝis pri la animo de la virtojn li konsideris la saĝecon, justecon, heroecon kaj piecon. Per lia doktrino estis influitaj pluaj filozofiaj lernejoj kaj sistemoj, en antaŭejon lin altigis eĉ Platono, kiu fondis tiel nomatan grandan lernejon de Sokrato.

El Spirit tradukis. Jaci



## HIPOKRATO PATRO DE MEDICINO

Kiel patro de medicino estis en malnova Grekio konsiderata HIPOKRATO, estimata estis kiel DIO de medicino – kuracado – ASKLEPIO. Laŭ legendo Asklepio ne nur resanigadis malsanulojn, sed ankaŭ revivigadis la mortintojn. Ĝuste Hipokrato laŭdire devenis el lia gento kaj daŭrigadis en liaj spuroj.

Hipokrato estis ankaŭ konsiderata kiel antikva saĝulo kaj vivis en la plej famekonata epoko de greka historio, ĝuste al li ni dankas por la ĝis hodiaŭ rekonataj etikaj principoj de medicino. La verkaĵo, kiu eniris la historion de medicino (Sintezo de Hipokrato) enhavas 60 kuracistajn dokumentojn kiuj devenas el 4-a aŭ 5-a jarcento antaŭ nia epoko. Dum lia aktiveco estis uzataj 6 000 sanigaj herbaĵoj.

En sia epoko estis Hipokrato estimata de ĉiuj kaj lia aŭreolo de lia gloro restas sur li eĉ post jarcentoj. Kiam li en 430 a. Kr. subpremis en Ateno la peston, li estis ordenita per honora civitaneco de la urbo.

Pli poste la persa reĝo ANTAKSERKSO postulis, ke Hipokrato alveturu Persion kaj batalu kontraŭ epidemioj, kiuj tie tiam furiozis. Sed tiutempe la Grekoj kaj la Persianoj estis malamikiĝintaj, tial Hipokrato rifuzis. La reĝo ekfurioziĝis, tiomgrade,




ke sendis al loĝantaro de la insulo KOS mesaĝon, en kiu li lin postulis, ke ili transdonu Hipokraton, se ne, poste ke ili ĉiujn iliajn urbojn neniigos. La Grekoj apelaciis je Dioj kaj la famekonatan patron de medicino ne transdonis. Sed la Dioj vere staris ĉe la loĝantoj de l'insulo KOS, ĉar, kiam ANTAKSERKSO legis ilian respondon, trafis lin apopleksio kaj tuj li mortis.

Ĝis la epoko de Hipokrato la medicino havis religian devenon, kaj la kuracado helpis sin ne sen manko de magiaj kaj religiaj metodoj. Hipokrato komencis serĉi denaturajn kialojn de simptomoj, oni serĉadis kialojn de malsaniĝo, kaj kuracilojn por kuracado.

Liaj kuracistoj evoluis teorion de 4 fundamentaj limfoj (sango, muko, galo, nigra galo). Ankaŭ la dormo kaj ekzercado direktiĝis laŭ jarperiodo, aĝo kaj karaktero de la paciento.

Eble la plej konata dokumento estas la « juro » de HIPOKRATO, kiu fariĝis normo de medicina etiko. Sed tiu ĉi juro ne devenas de Hipokrato mem, ĝi estas el pli posta tempo. En moderna tempo ĝi estis anstataŭigita per kuracista promeso.



El SPIRIT  
Trad. Jaci


## Finiĝis la Abon-periodo 2007


La abon-periodo 2007 jam finiĝis per la lasta numero 140. Ĉi-tiu numero 141 jam estas la unua de la jaro 2008. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 142 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2008.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin per la mesaĝo "Fino de abono!!", ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2008. Se efektive tia mesaĝo troviĝas sur ĝi, tiam bonvolu senprokraste pagi vian abonon laŭ la ĉi-suba tarifo.

La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekventa jaro 2009.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

Jaroj:		2008	2009	2010
Abono por adresoj en Francio:		12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:		6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.		9 eŭroj
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago).		23 eŭroj
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Esperanto</i>		58 eŭroj
Pagmanieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2008 por 1027			
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2008, 2009 ktp. Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	<b>4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn:</b> IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)			
	<b>Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo</b> Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato. Ĝi estas samtempe mendebla kaj pagebla ĉe nia kasisto. La libro estos sendita al vi rekte el Japanio.			Afrankite 26 eŭroj



**63-a Regiona Kultursemajnfino de Esperanto**  
**VIGY ( 57 )**

**2 / 4-ajn de majo 2008 - rapide aliĝu, aliĝu, aliĝu !**  
**elstara programo !**





# El nia libroservo



**Claude Piron**  
1931 / 2008



## Por mendi librojn:



- Vi sendas vian mendon
  - per poŝto (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
  - per e-poŝto al [«libroservo.efe@wanadoo.fr»](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)
  - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 19a horo.
- Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikante sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

## Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la 62 an regionan staĝon de esperanto en Vigy la 2an-3-4ajn de majo 2008. Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo ( libroservo, 37 rue Pierre et Marie Curie, FR-54500 VANDOEUVRE ) [libroservo.efe@wanadoo.fr](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)

### .....forpasis Claude Piron !

*Maloftas en esperanta literaturo , ke subskribo certigas amasan vendon de libroj.*

*En 1986, nia federacia libroservo deĵoris dum la UFE-kongreso en Gérardmer. Ĵus aperis tiam nova libro titolita "ĉu rakonti novele ? ". Kiel por ĉiu nov-eldonaĵo, ni estis aĉetintaj 3 ekzemplerojn.*

*Nur kelkajn minutojn post la malfermo de la libroservo, tiuj tri libroj estis venditaj, kaj dek aŭ dek-kvin aĉetuntojn ni malkontentigis pro malhavo !*

*Tiam mi spertis la popularecon de Claude Piron.*

*La aliflanka paĝo montras parton de liaj esperantlingvaj libroj.*

*Lia erkaro estas tre diversa : poezio ( Malmalice ), krimromanoj ( la "Ĉu-serio" sub pseŭdonimo Johan Valano ), kie li ŝatis inviti sian alian fakon : psikanalizo, "lingvo-instruaj" romanetoj, kiuj tiel bone klarigis al komencantoj, kiel plene uzi la rimedojn de esperanto por krei riĉan lingvon el malmultaj radikoj ( Gerda malaperis, Ili kaptis Elzan ... ), "propagandaj" verkoj, kie li demonstris al Babelanoj la efikecon de Esperanto ( Le Défi des Langues ).*

*Tre certe Claude Piron estis unu el la plej grandaj verkistoj de Esperanto. Li proksimiĝis al perfekteco en posedo de la lingvo, kunvivigante simplecon kaj klarecon, preferante forĝi vortojn kaj esprimojn per plenuzado de afiksoj kaj gramatikaj eblecoj per neologismemo.*

*Lia forpaso tuj post la apero de lia lasta libro anoncas grandan malplenon. Li ĉiam kore akceptis psiĉojn en siaj verkoj. Se li ekzistas, Dio agadu kun li same !.*

JLT

### Libroj de Claude Piron nuntempe haveblaj en la libroservo

**Dio, psiĉjo kaj mi**, romano, 176 p, I.E.M., 16,50 €. "dialogo inter viro kun neordinaraj mistikaj travivaĵoj sentataj kiel realaj kaj materiisma specialisto provanta kompreni mondon, kiu por li povas esti nur mensa kaj halucina".

**Gerda malaperis** romano, 48 p, Fonto., 2,00 €. lingvo-instrua romaneto.

**Ili kaptis Elzan**, romano, 104 p, Fonto, 3,50 €. lingvo-instrua romaneto.

**Lasu min paroli plu**, romano, 130 p, Fonto., 9,00 €. lingvo-instrua romaneto.

**Ĉu ŝi mortu tra-fike**, romano, Johan Balano 76p, I.E.M., 9,90 €. krimromano.

**La meteoro**, noveloj, 240 p, I.E.M., 14,40 €.

**vere aŭ fantazie**, romano, 76p, Fonto., 12,00 €.

**Malmalice**, poezio, 76 p, I.E.M., 6,00 €.

**Esperanto el la vidpunkto de verkisto**, lingvo, 16p, Pro Esperanto, 3,00 €.

**La bona lingvo**, lingvo, 116 p, I.E.M., 12,00 €.

✕.....

### MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-  
-  
-

al jena adreso:

S-ro/ino

En

la

Subskribo:

# 63-a Regiona Staĝo

## de **esperanto**

# ALIGILO

## Partoprenu !

### Vigy (Moselle)

### 2-3-4 majo 2008

KONGERTO DE JOMO  
CONCERT DE JOMO



*Prelego pri historio de Loreno  
Conférence sur l'histoire de la  
Lorraine*

**Catherine GALLEGO**

*Tincjo kiel lernolibro...kaj aliaj  
rimedoj por plibonigi siajn  
konojn kaj parolkapablojn...  
Tintin comme livre d'étude...et  
d'autres remèdes et moyens  
pour enrichir ses  
connaissances et son  
expression orale...*

**Michel DECHY**



**Kiel  
alveni?**

**Comment arriver ?**

Vigy estas facile atingebla :

Vigy est facile à atteindre:

Luxembourg 66 km

Mulhouse 236 km

Nancy 77 km

Strasbourg 150 km

Fervoja stacidomo SNCF en Metz 17 km

**Pliaj informoj :**

**Plus d'informations :**

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

<http://www.mairie-vigy.fr/>

<http://train.touristique.canner.la-moselle.com/>

<http://tourisme.mairie-metz.fr/>

<http://www.moselle-tourisme.com/>


<http://www.myspace.com/jomoleclerg>

**LIBROSERVO**

**SERVICE DE LIBRAIRIE**

37 rue P. et M. Curie

FR-54500 VANDOEUVRE [libroservo.efe@wanadoo.fr](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)



**ESPERANTO  
THONVILLE**



**esperanto**  
France-Est

## Internacia renkontiĝejo en Loreno

### Centre international de séjours en Lorraine



La internacia restadejo "ADEPPA" kiu troviĝas je 15 km de Metz ĉe la lorena vilaĝo Vigy, rande de la arbaroj de Vigy kaj Saint-Hubert, ĝuas bonegan lokon en la koro de la "Lando de la tri limoj kaj Metz-a valo", proksime de landlimoj de Germanio kaj Luksemburgio. La regiono kiu havas riĉan kaj diversan historian heredaĵon, subtenas la verdan, industrian, kulturen kaj militan turismon : muzeoj, "Maginot Linio", termobanejo kaj zoologia parko de Amnéville les Thermes, amuziĝa parko : "Waligator" en Hagondange, turisma trajno de la Vallée de la Canner kaj la 3000 jara urbo Metz !

Vi povos promeni kaj ripozi meze de 13 hektara verda bieno.

Le Centre International de Séjour "ADEPPA", situé à 15 km de Metz, en bordure de Vigy village lorrain, et à la lisière des forêts de Vigy et de Saint-Hubert, bénéficie d'un emplacement privilégié au cœur du "Pays des trois Frontières et du Val Messin" non loin des frontières de l'Allemagne et du Luxembourg. La région, au patrimoine historique riche et varié, favorise le tourisme vert, industriel, culturel et militaire : musées, Ligne Maginot, centre thermal et parc zoologique d'Amnéville les Thermes, parc Waligator à Hagondange, train touristique à vapeur de la Vallée de la Canner et la ville de Metz aux 3000 ans d'histoire !

C'est au milieu de 13 ha de verdure que vous pourrez vous promener ou vous reposer.

**Association Adeppa (Centre International de Séjour):**

avenue Charlemagne; FR 57640 VIGY (Francio)

**Programo diversa por ĉies intereso**      **Programme varié pour tous**

La anoj de Esperanto Thionville preparas por vi tre diversan kaj riĉan programon okaze de tiu internacia amikeca renkontiĝo:

**Vendrede 2an de majo 2008**

- 17a00 : akcepto de la unuaj alvenantoj, vizito de la domo, la parko kaj libera promenado en la vilaĝo,
- 19a00 : vespermanĝo,
- 20a30: videofilmo pri 92a UK en Jokohamo 2007, Bernard VIVIER,
- 21a30 : bonveno, interkonatiĝo.



Les membres de l'association Espéranto - Thionville vous préparent un programme riche et varié pour cette rencontre internationale.

**Vendredi 2 mai 2008**

- 17h00: accueil des premiers participants, visite de la maison, le parc et promenade libre au village,
- 19h00: dîner,
- 20h30: film vidéo sur le 92 ème congrès universel d'Espéranto à Yokohama en 2007, Bernard VIVIER,
- 21h30: bienvenue, soirée "Faisons connaissance...".

- 08a00-09a00 : mantenmanĝo,
- 09a00-11a30 : kurso A, promenado,
- 12a00-13a00 : tagmanĝo,
- 13a00: libera tempo, digesta promenado,
- 13a00-14a15 : akcepto de la staĝanoj,
- 14a15-18a00 : kursoj A, B, C, D (prelego), infanoj E,
- 16a30-17a00 : paŭzo - libroservo,
- 18a15-19a00 : deklamado de Robert Kueny,
- 19a00 : vespermanĝo,
- 20a30-22a00 : koncerto de "Jomo" en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

## Dimanĉe 4an de majo 2008

- 08a00-09a00 : mantenmanĝo,
- 09a00-11a30 : kursoj A, B, C, D (prelego), infanoj E,
- 12a00-13a00 : tagmanĝo,
- 13a30 : ekskurso laŭ via deziro per turista trajno de valo « Canner » de Vigy al Hombourg -Budange kaj reiro.

Dimanĉe 4an de majo je la 14a00 : ĝenerala kunveno de la Federacio "Espéranto France Est" - assemblée générale de la Fédération Espéranto France Est.

A por komencantoj / débutants Marcel Redon; B por progresantoj / pratiquants André Grossmann; C konversacio / conversation Michel Déchy; D prelego / conférence Catherine Gallego; E Infanoj / enfants Ginette Martin.

## Dimanche 4 mai 2008

- 08h00-09h00: petit déjeuner,
- 09h00-11h30: cours A, B, C, D (conférence), enfants E,
- 12h00-13h00: dîner,
- 13h30: excursion selon votre désir avec le train touristique de la vallée de la Canner de Vigy à Hombourg-Budange et retour.

## Aliĝilo (vidu prezojn aliflanke) - Bulletin d'inscription (tarifs au dos)

S-ro/ Mr S-ino / Mme	Familia nomo / Nom	Persona nomo / Prénom	Aliĝkotizo/ Cotisation	Vegetarano/ Végétarien	Elektita kurso/ Cours choisis
1 ĉefaliĝanto					
2 kunaliĝanto					
3					
4					

Adreso (Adresse) : .....

Poŝtkodo (CP) : ..... Urbo (Ville) : .....

Lando (Pays) : ..... Tel : .....

Retadreso (courriel) : .....

Nombro da manĝoj Nombre de repas	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo, déjeuner			1
Vespermanĝo, dîner		1	
Tranoktado + matenmanĝo, nuit + petit-déjeuner		1	

<b>Mia prefero Ma préférence</b>	<b>Ĉiuj ĉambroj enhavas lavabon sen tualettuko. La duŝejo kaj necesejo estas ĉe la etaĝo. Toutes les chambres ont un lavabo sans serviette de toilette. Les douches et les toilettes sont à l'étage.</b>
	Unulita ĉambro (nur 2 ĉambroj). Chambre à un lit (seulement 2 chambres).
	Ĉambro kun 2, 3 aŭ 4 litoj. Chambres à 2, 3 ou 4 lits.
	Se vi interkonsentis kun iu por tranokti en la sama ĉambro bonvolu indiki la nomon en la maldekstra kolumno. Si vous avez convenu de partager votre chambre avec quelqu'un veuillez indiquer son nom dans la colonne de gauche.

<b>Kotizoj</b>	Abonanto al La Informilo	Ne abonanto al La Informilo	<b>Cotisations</b>	Abonné à La Informilo	Non abonné à La Informilo
<input type="checkbox"/> Ĉefaliĝanto	30€00	42€00	<input checked="" type="checkbox"/> Adhérent principal	30€00	42€00
<input type="checkbox"/> Kunaliganto	25€00	25€00	<input type="checkbox"/> Co-adhérent	25€00	25€00
<input type="checkbox"/> Mi aliĝas post 15/02/2008	+10€00	+10€00	<input checked="" type="checkbox"/> J'adhère après le 15/02/2008	+10€00	+ 10€00
<input type="checkbox"/> Mi aliĝas post 30/04/2008	+15€00	+15€00	<input type="checkbox"/> J'adhère après le 30/04/2008	+15€00	+ 15€00
<input type="checkbox"/> Infano malpli ol 15 jara, studento	1€00	1€00	<input type="checkbox"/> Enfant de moins de 15 ans, étudiant	1€00	1€00
<input type="checkbox"/> Junulo malpli ol 26 jara	15€00	15€00	<input type="checkbox"/> Jeune de moins de 26 ans	15€00	15€00

La aliĝkotiĝo entenas la partoprenon al elektitaj kursoj aŭ prelegoj kaj al la distraj vesperoj. Ĝi ne estas repagebla krom grava kialo.  
La cotisation comprend la participation aux cours ou conférences choisis et aux soirées récréatives.  
Elle n'est pas remboursable sauf cas de force majeure.

<b>Restado</b>	<b>Prezo</b>	<b>Séjour</b>	<b>Prix</b>
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 persono dum 2 tagoj (2 trankoktoj + 2 mantenmanĝoj + 2 tagmanĝoj + 2 vespermanĝoj).	84€00	<input type="checkbox"/> Pension complète pour 1 personne pour 2 jours (2 nuits + 2 petits déjeuners + 2 déjeuners + 2 dîners).	84€00
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 persono dum 1 tago (1 tranokto + 1 mantenmanĝo + 1 tagmanĝo + 1 vespermanĝo).	42€00	<input checked="" type="checkbox"/> Pension complète pour 1 personne pour 1 journée (1 nuit + 1 petit déjeuner + 1 déjeuner + 1 dîner).	42€00
<input type="checkbox"/> Unu nura trankokto kun mantenmanĝo.	18€00	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner.	18€00
<input type="checkbox"/> Unu nura tag-aŭ vespermanĝo.	13€40	<input type="checkbox"/> Un seul repas déjeuner ou dîner	13€40
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 junulo malpli ol 10 jara dum 2 tagoj (2 trankoktoj + 2 mantenmanĝoj + 2 tagmanĝoj + 2 vespermanĝoj).	50€40	<input type="checkbox"/> Pension complète pour 1 enfant de moins de 10 ans pour 2 journées (2 nuits + 2 petits déjeuners + 2 déjeuners + 2 dîners).	50€40
<input type="checkbox"/> Plena pensio por 1 junulo malpli ol 10 jara dum 1 tago (1 tranokto + 1 mantenmanĝo + 1 tagmanĝo + 1 vespermanĝo).	25€20	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner pour 1 enfant de moins de 10 ans pour 1 journée (1 nuit + 1 petit déjeuner + 1 déjeuner + 1 dîner).	25€20
<input type="checkbox"/> Unu nura trankokto kun mantenmanĝo por 1 junulo malpli ol 10 jara.	10€80	<input type="checkbox"/> Une seule nuit avec petit déjeuner pour 1 enfant de moins de 10 ans.	10€80
<input type="checkbox"/> Unu nura tag-aŭ vespermanĝo por 1 junulo malpli ol 10 jara.	7€70	<input type="checkbox"/> Un repas ou dîner pour 1 enfant de moins de 10 ans.	7€70
<b>Donaco</b>		<b>Don</b>	
<b>SUME</b>		<b>TOTAL</b>	
<b>SUMO ENTUTE (Kotizo + restado) =</b>	€	<b>SOMME TOTALE (Cotisation + séjour) =</b>	€


Bonvolu sendi la aliĝilon kun antaŭpago (minimume la kotizo) al :  
Veuillez envoyer le bulletin d'adhésion avec un acompte (au minimum la cotisation) al :

Esperanto-Thionville  
c/o Bruno HENRY  
8 rue Pasteur


FR-57240 NILVANGE (Francio) Tel.: +33 (0)3 82 53 25 47  
retadreso: esperanto-thionville@laposte.net

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de Esperanto - Thionville /  
Chèques et virements au nom de Espéranto - Thionville  
Internacia ĝiro / Virement international IBAN :  
FR76 1027 8051 0000 351 0494 506  
BIC : CMCFIFR2A  
Ĝis baldaŭ ! (via aliĝo validos nur post ricevo de via pago  
- votre adhésion ne sera valide qu'après réception de  
votre paiement.)





# DISTRANGLULO



Gratulon al la du partoprenintoj en nia jarfina konkurso, kiuj solvis la proponitajn enigmojn, kaj sekve ricevis verkon el nia libroservo !...

**Monique BICHE**, 21 rue Jean-Louis Delaporte, 10000 TROYES

**Ginette MARTIN**, 92 rue du riant coteau, 88290 SAULXURES-sur-MOSELLOTTE

Vertikala enigmo : malfacilas prognozi sen eraroj, ĉefe kiam oni celas la futuron !

Mistera krado : nenio ne povas utili al ĉio, sed ĉio povas utili al nenio !

Nova vertikala enigmo 

1 + - - + - - -  
 2 + - - + - - - -  
 3 + - - + - - -  
 4 + - - + - - -  
 5 + - - + - - -  
 6 + - - + - - -  
 7 + - - + - - -  
 8 + - - + - - -  
 9 + - - + - - -  
 10 + - - + - - -  
 11 + - - + - - -  
 12 + - - + - - -  
 13 + - - + - - -  
 14 + - - + - - -  
 15 + - - + - - -  
 16 + - - + - - -  
 17 + - - + - - -  
 18 + - - + - - -  
 19 + - - + - - -  
 20 + - - + - - -  
 21 + - - + - - -  
 22 + - - + - - -  
 23 + - - + - - -  
 24 + - - + - - -

ofta surstrata akcidento  
 ofende fiera  
 insekse vivulo  
 pelto de didelfo  
 nekulturata grundo, kie kreskas tufarbustoj  
 firma, fortika  
 difinita kuracrimedo  
 agrabla odoro  
 aŭdebla aervibrado  
 spasme kaj brue elspiri aeron  
 ilo por movi boaton  
 iama loĝanto de Hispanio  
 tre bezonata  
 grava, danĝera fazo  
 monato  
 lerte maipuli objektojn  
 maniero pensi aŭ juĝi  
 metala aŭ leda brustoŝirmilo  
 iama sakra birdo  
 projekto ne ankoraŭ konstatebla  
 psika malvigleco  
 sin konformi al ordono  
 vicigi var-vagonojn  
 trakti pli malpli lojale

unu el la devizoj  
de la Ŝadokoj



pri la plej grava malsano  
de la cerbo  
kulpas la pripensado...

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj, alfabete ordigitaj, malkovru la 24 vortojn, kies difinoj troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos novan humuran citaĵon de Alphonse Allais.

ap ar aro ce da de ei er fe gan gli ĝi ib ibe ike in io io iso jo ĵon ki ko kri li li li lo lo lo ma  
 ma mi mo mo ne ni ni no ob omo op op opo pio pri pu ra ra ran re ri ro sa so so so su te  
 ter to ut zio zo

Kvin geamikoj, kiuj veturas en iu *Audi QUATTRO* atingas impost-pag-giĉeton kaj frontas al deĵoranta policisto...



Tiu lasta, tre serioze...

- Kvin personoj en *Audi QUATTRO* ne eblas... Unu el vi devas elaŭtiĝi !

La stiranto, duonamuze...

- Nu, aŭskultu, la nomo de la veturilo tute ne rilatas al la nombro da gastoj !

**Kvin** rajtas normale sidi en la veturilo !

- Neulte argumenti ! Vi sidas en *Audi QUATTRO*, kiu rajtas enteni nur kvar personojn. Unu el vi

eliru, kaj vi povos forveturi !

La stiranto, kiu eknervozigas...

- Mi informas vin, ke la vorto *QUATTRO* rilatas al tirado far kvar radoj !

- Ĉesigu la babiladon !... Nur kvar gastoj ene !

La stiranto, kolerema...

- Finiĝu tiu stultaĵo ! Venigu vian ĉefon por solvi inteligente la problemon !...

- Ne eblas ! Li ja okupiĝas pri du fuŝuloj, kiuj veturas en *Fiat UNO* !...





... ĉe la Azov-marò ...



... "Konvalo" ĉiĉeronas en Taŝkento ...



... Frédéric magias ...



... vin-gustumado ĉe Anton ...



... plej amika tagmanĝo laŭ la uzbeka kutimo ...